

Serenaj matenoj



Julian Modest

Titolo Serenaj matenoj

Aŭtoro Julian Modest

Provlegis Yves Nevelsteen kaj Lode Van de Velde

Kovrilbildo Falco

Eldonjaro 2018

ISBN 978-0-244-11565-4

JULIAN MODEST
SERENAJ MATENOJ

krimromano, originale verkita en Esperanto

ANTAŬPAROLO

buntkolora kaj alloga krimromano

Julian Modest estas Esperanto-verkisto, konata ne nur en Bulgario. Per sia multnombra verkaro en bulgara lingvo kaj en Esperanto li formis klaran, tre agrablan kaj serĉatan fizionomion de aŭtoro kun propraj stilkonstruo kaj vorta trezoro. Pluraj liaj artikoloj kaj rakontoj troveblas en naciaj kaj internaciaj Esperanto-revuoj kiel “Fonto”, “Monato”, “Literatura Foiro”, “Zagreba Esperantisto”, “Bulgara Esperantisto” kaj aliaj. Produktaĵoj de liaj majstreco kaj talento estas ŝatataj romanoj, eseeroj, novelaroj, dramoj, kiuj nutras la Esperanto-legantaron en eŭropa, amerika kaj azia partoj de la larĝega Esperantujo.

La protagonistoj, la belegaj literaturaj bildoj de ĉirkaŭa naturo, la bunteriĉa lingvo de la aŭtoro havigas abundan ĝuon, ĝojon aŭ emocian triston kaj teneran vibradon en la koroj de la legantoj. Ni rememoru la rakonton “Vulpa Restoracio” el la libro “Mara Stelo”, kie la ĉarma intrigo kaj fajna lingvomajstreco de Julian Modest provokas larmojn de la kortuŝita leganto.

Nun mi kuraĝas aŭguri, ke la Esperanto-kulturo gravediĝis per la krimromano originale verkita en Esperanto de nia estimata amiko kaj samideano Julian Modest. Bonŝanca ĝojo por mi estis konatiĝi kun la manuskripto de la naskiĝonta krimromano “Serenaj Matenoj”.

Konsciante la komplikecon atendi sukceson de krimbranĉa literatura verko, kie la verkisto ne nur devas elekti temon, tempon, lokon (scenejon de la okazintaĵoj), personaron kaj kompreneble riĉan sendube flekseblan kaj samtempe precizan lingvon, tamen scii kaj kapabli enmiksi kaj akcenti la rilatojn kaj la ligojn, kaŝi, esplori, pridemandi, kombini, utiligi ĝustaloke emociojn kaj viklecon, la aŭtoro kiel teksisto-magiisto enplektis buntkoloran tapiŝon belegan ne nur por la okuloj de la produktanto, sed certe kaj sendube ankaŭ por la legantoj.

La loko, kie okazas la krimaj agoj de “Serenaj Matenoj”, estas la suda Nigramara regiono de Bulgario. La aŭtoro tre bone konas la regionon, kiu estas lia naskiĝprovinco kun karaj urbetoj, vilaĝoj kaj naturfenomenoj. Ĉi situo nepre helpas al la aŭtoro.

Julian Modest emas inspire priskribi la naturajn belecojn, la transpaŝon de la vintro al printempo kun aromoj kaj koloroj, la grizajn nubojn, la bluiĝantan ĉielon kaj kompreneble la serenajn bonhumoron de la homoj. Kontraste al tiu ĉi revigliĝo de la ĉirkaŭa vivo, alflugas novaĵo pri malapero de la filino de la urba kuracisto – lernantino en la lasta gimnazia klaso. Ŝiaj beleco kaj literatura talento estas larĝe sciataj inter geamikoj kaj instruistoj. Ŝiaj gepatroj serĉas profesion helpon de la polico.

La komencaj paĝoj de la romano entute ne donas signojn pri radikaj ŝanĝoj de la intrigo. La aŭtoro Julian Modest per ĉarma maniero nerimarkeble kaj tre flue efektivas brilante sukcese la ĉiaman deziron de ĉiu aŭtoro – ĝuigi, kontentigi la leganton kaj li aŭ ŝi ne formetos la libron antaŭ ĝia tuta tralego.

Mi garantias plezuron kaj neimageblan kontentigon al la legantoj. Facila, flua, ĉarma lingvo, plezuro de la buntaj esprimoj eĉ en la momentoj de enplekto de esploranalizaj elementoj, kiuj tamen plifortigas kontentojn de la ĉarmita leganto. Agrablan legadon, kara leganto.

inĝ. Petar Todorov

1.

En la etaj urboj, trankvilaj kaj silentaj, situantaj ĉe la piedoj de iu monto aŭ ĉe mara bordo, ne estas multaj historiaj vidindaĵoj kaj turistoj malofte vizitas ilin. Unu el tiuj ĉi urbetoj estas Marino, en kiu same estas ĉefa strato, urbodomo, kulturdomo, preĝejo... Proksime al la urba placo troviĝas parko kun kelkaj benkoj, infanludiloj, arboj: tilioj, kaŝtanoj kaj du abioj. La administracio de la urbodomo ne ĉiam havas sufiĉe da mono kaj la parko estas iom neglektita. Oni malofte falĉas la herbon, delonge la benkoj ne estas refarbitaj kaj jam necesas iom ripari la infanludilojn, ĉar la infanoj falos de la lulilo aŭ de la balancilo.

Se oni ekiras sur la ĉefa strato al la mara bordo, dekstre vidos straton "Blua Maro", kie troviĝas la baza lernejo, duetaĝa konstruaĵo, kies malnova tegola tegmento montras, ke la lernejo estis konstruita pasintan jarcenton. Ĉe la baza lernejo estas la infanĝardeno, blanka konstruaĵo, en ne tre granda korto kun infanaj ludiloj kaj bedoj kun floroj.

Ĉe la fino de la ĉefa strato, proksime al la mara bordo, maldekstre estas la granda restoracio "Fiŝkaptista Renkontiĝo". Ĝi havas vastan ejon kaj halon, en kiu somere oni ordigas multajn tablojn kaj de tie eblas ĝui la senliman bluan maron. Dum dimanĉo kaj sabato en la restoracio ludas orkestro, kantas kantistino. La muziko kaj la kantado aŭdeblas en la tuta ĉirkaŭaĵo. Sabate kaj dimanĉe ĉi tien venas multaj familioj. La patroj mendas brandon kaj salaton, la patrinoj trinkas bieron kaj la infanoj – limonadon. La tuta familio vespermanĝas bifstekon kun frititaj terpomoj. Festa vespermanĝo, post kiu la familio kontenta revenas hejmen.

En Marino preskaŭ ne estas trafiko. Iuj el la loĝantoj havas aŭtojn kaj per ili veturas al la proksima urbo Burgo. Ĉi tien venas nur unu aŭtobuso, sesfoje tage.

Foje Vlad Ezokov hazarde venis en la urbeton. Tiam li veturis aŭte sur la ŝoseo al urbo Rosen, vidis la panelon "Urbo

Marino” kaj decidis trarigardi ĝin. Tiam li tute ne supozis, ke post jaroj loĝos ĉi tie.

Je la komenco de marto Vlad venis kaj luis loĝejon en Marino. La domo estis malnova, unuetaĝa. Ĝin posedis maljuna familio, sed antaŭ jaroj la geedzoj forpasis kaj ilia filo, kiu kun sia familio loĝis en Burgo, luigis la domon. Malgraŭ malnova, ĝi plaĉis al Vlad. Estis tri ĉambroj: kuirejo, gastoĉambro, dormoĉambro kun banejo. Tute sufiĉe por sola persono. De la eta vestiblo oni eniris la kuirejon, la gastoĉambro kaj la dormoĉambro.

La posedanto de la domo, viro, kvardekjara, maldika, iom kurbiĝinta, kalva, demandis Vlad ĉu necesas elpreni la malnovajn meblojn el la domo, sed Vlad respondis, ke preferas uzi ilin. Li tute ne emis aĉeti novajn meblojn kaj ne sciis kiom da tempo loĝos ĉi tie. En la vestiblo estis vesthokaro, ŝranketo por ŝuoj kaj eta tablo. Sur la vesthokaro pendis bastono, restinta de iu el la maljunuloj, kiuj loĝis ĉi tie. La kuirejo aspektis mizera – malnova lavujo, kredenco, ne tre alta servicoŝranko, ligna manĝotablo. En la gastoĉambro – kafotablo, du foteloj kaj librobretaro kun kelkaj libroj kaj malnovaj ĵurnaloj. En la dormoĉambro – duobla lito, vestoŝranko.

La domo estis en ne tre vasta korto kun fruktaj arboj: pomarbo, persikarbo, prunarbo, sub kies ombro somere oni povis sidi kaj kafumi. Vlad iom purigis la ĉambrojn, sed ne tro penis. Li nur viŝis la polvon kaj lavis la manĝotablon, kiu estis tre malpura kun sekigitaj oleaj makuloj. La fenestroj same estis malpuraj, sed li tute ne planis lavi ilin. Ja tio superfluis, opiniis Vlad. Li nur aĉetis litotukojn kaj kusensakon.

Vlad atente trarigardis kaj trafolumis la librojn sur la librobretaro, estis malnovaj kun flaviĝintaj paĝoj. Videblis, ke iujn el ili oni legis, aliajn eĉ ne trafolumis.

De tempo al tempo Vlad promenadis sur la mara bordo, iris frue matene kaj oni povis vidi lian silueton sur la strando.

La suno aperis, kvazaŭ elnaĝis el la maraj ondoj kaj lumigis la korpon de Vlad, kiu similis al bronza statuo. Iam ankaŭ posttagmeze li promenadis ĉe la maro kaj revenis hejmen, kiam la suno subiĝis kaj ĝiaj lastaj sunradioj lumigis la ruĝajn tegolajn tegmentojn de la domoj.

2.

Kiam Vlad Ezokov ekloĝis en la domo de familio Vihrovi, la najbaroj komencis demandi sin kiu li estas, de kie li venis kaj kial li loĝas sola ĉi tie. Ordinare la virinoj estas pli scivolemaj kaj deziras tuj ekscii ĉion. Apud la domo, en kiu ekloĝis Vlad, estis la domo de onklino Nada. Sesdekkvinjara ŝi loĝis sola. Ŝia edzo Ivan, kiu estis maristo, forpasis antaŭ tri jaroj. La filino de Nada loĝis en Burgo kaj malofte venis al Marino al la patrino. Tutan tagon onklino Nada vagis tien-reen hejme kaj preskaŭ ne eliris eksteren.

Kiam Vlad ekloĝis ĉi tie, ŝi komencis tre atente observi lin, precize sciis, kiam li eliras, kiam promenadas ĉe la mara bordo, kiam revenas, kiam iras en la nutraĵvendejon aĉetadi. Pluraj demandoj pri la najbaro okupis Nada-n, sed vane ŝi provis trovi la respondojn. Vlad estis ĉirkaŭ tridekjara, videblis, ke ne laboras, preskaŭ ĉiutage estis hejme kaj de tempo al tempo iris ien per la aŭto.

“Ĉu li havas laboron, demandis sin onklino Nada? De kie li havas monon? Ja, lia aŭto estas moderna, por ĝi necesas benzino kaj la benzino kostas monon. Li loĝas tute sola. Neniu gastas al li, nek viroj, nek virinoj. Ĉu li havas, aŭ havis familion?”

Tiuj ĉi demandoj forte tiklis ŝian scivolon kaj Nada decidis iri en la domon de Vlad por konatiĝi kun li kaj vidi kiel li vivas, kio estas en lia domo kaj eventuale ekscii pri kio ĝuste li okupiĝas.

Iun matenon Nada survestis sian plej novan robon, sur kies flavkolora silka ŝtofo estis stampitaj rozoj, ruĝsminkis la

lipojn kaj ekiris al la najbara domo. Ŝi malfermis la metalan pordon de la korto, trapasis la distancon inter la barilo kaj la domo, kaj sonoris ĉe la pordo. Estis la deka kaj duono kaj ŝi sciis, ke Vlad estas hejme.

La pordo malfermiĝis, antaŭ Nada ekstaris Vlad.

-Bonan matenon – salutis ŝi lin. – Pardonu min pro la ĝeno, mia nomo estas Nada Likova, najbarino. Mi loĝas en la najbara domo.

Vlad silente rigardis ŝin.

-Mia elektra forno difektiĝis. Mi loĝas sola. Ja, viroj estas spertaj riparistoj. Ĉu vi povus veni helpi min, vidi kial difektiĝis la forno?

Ŝi esperis, ke Vlad invitos ŝin en la loĝejon, prezentos sin al ŝi, sed li nur silentis.

-Ja, ni estas najbaroj, estus bone helpi unu la alian – daŭrigis iom embarasite Nada, tamen Vlad interrompis ŝin:

-Pardonu, mi ne estas teknikisto kaj ne povas ripari fornojn. Krom tio mi estas okupata.

Tiuj ĉi liaj vortoj ofendis onklinon Nada. Ŝi tramurmuris “pardonon, pardonon” kaj rapide foriris. Post tiu ĉi unua renkontiĝo kaj mallonga konversacio, Nada malamis la najbaron.

Foje Vesa, amikino de onklinino Nada, kiu loĝis en la sama strato, demandis ŝin:

-Nada, kiu estas via nova najbaro? Ja, vi loĝas plej proksime al li kaj verŝajne scias ion pri li, ĉu?

-Li estas tre suspektinda persono - konfidence diris Nada. – Danĝera homo! Pri nenio li laboras, kun nenio li renkontiĝas kaj amikiĝas. Sendube li venis ĉi tien por kaŝi sin. Verŝajne li estas krimulo kaj deziras, ke nenio sciu ion pri li.

-Ĉu? – miris Vesa. – Ankaŭ mi supozis tion. Li kun nenio konversacias, kun nenio konatiĝas.

-Jes. Mi certas, ke li havas suspektindan pasintecon. Eble li estis en malliberejo. Kiam oni liberigis lin, li venis ĉi tien, kie nenio konas lin – daŭrigis Nada kaj en ŝiaj verdecaj

okuloj, iom similaj al katokuloj, aperis maltrankvilo kaj timo. – Pri li mi demandis la urbestron, sinjoron Popov, tamen li diris, ke nenion scias pri la ulo.

-Kiel eblas? – alrigardis ŝin Vesa. – Ja, li estas urbestro kaj devas koni ĉiujn, kiuj ekloĝas en nia urbo.

-Sinjoro Popov nur diris, ke nun ĉiu povas loĝi kie deziras, en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝo kaj ne estas lia devo interesiĝi pri la intima vivo de la loĝantoj – klarigis Nada.

-Kiel? La urbestro reprezentas la ŝtaton kaj lia devo estas zorgi pri la loĝantoj. Li nepre devas esplori la pasintecon de tiu ĉi ulo! –insistis Vesa.

-Devas, devas – ridis ironie Nada. – Vi vidas, ke la ŝtato tute ne interesiĝas pri ni. Estas ŝtelistoj, rabistoj, murdistoj kaj nek la ŝtato, nek la polico persekutas ilin. Ni devas mem zorgi pri nia sekureco. Mi konsilas vin esti pli malproksime de nia nova najbaro. Ja, neniu scias kiu li estas.

Onklino Nada rapide adiaŭis Vesa-n, ĉar vidis, ke la aŭto de Vlad eliras el la korto.

-Jen, li denove veturos ien – diris Nada. – Mi ne deziras, ke li vidu min. Ĝis revido. Mi venos al vi, ĉar mia elektra forno difektiĝis kaj mi petos vian edzon, Petar, ripari ĝin.

-Venu, venu – diris Vesa kaj ekiris hejmen.

Vesa, sesdekjara virino, alta blondhara kun simpatia vizaĝo kaj bluaj okuloj loĝis en la domo sur la alia flanko de la strato. De kelkaj jaroj ŝi kaj ŝia edzo estis pensiuloj. Vesa estis flegistino en la urba hospitalo en Burgo kaj la edzo, Petro – aŭtobusŝoforo. Irante hejmen, Vesa meditis pri la nova najbaro. Antaŭ kelkaj jaroj preskaŭ ĉiuj en Marino konis unu la alian. En la malgranda urbo iuj el la loĝantoj estis samklasanoj, aliaj – kolegoj en la laborejoj kaj multaj estis parencoj. Kio okazis nun? Nekonataj homoj venis loĝi ĉi tien kaj oni tute ne scias kiuj ili estas, de kie venis kaj pri kio okupiĝas. Tio estas danĝera, kiel diris Nada. Oni devas atenti kaj plej grave, gardi la infanojn, ĉar ili estas senhelpaj, naivaj kaj ĉiu ulo povus

allogi ilin kaj fari ion malbonan al ili. Post la konversacio kun Nada, Vesa certis, ke Vlad vere estas danĝera homo.

Kiam ŝi eniris la domon, Petar, la edzo, sidis ĉe la tablo en la kuirejo kaj legis ĵurnalon.

-Kie vi estis? – demandis li kaj alrigardis ŝin tra la okulvitroj, kiujn li surhavis.

-Strate mi renkontis Nada-n kaj ni iom konversaciis – respondis Vesa. – Ŝi opinias, ke la najbaro, kiu loĝas apud ŝia domo, estas danĝera homo. Laŭ ŝi oni verŝajne ĵus liberigis lin el la malliberejo kaj li ekloĝis en nia urbo por kaŝi sin.

-Vi parolas stultaĵojn – komencis ridi Petar.

Altstatura, iom dika kun griziĝanta hararo, li havis nigrajn okulojn, densajn brovojn kaj iom kurban nazon.

-Nada imagas sin granda detektivo – ridis Petar. –La viro antaŭnelonge ekloĝis ĉi tie kaj ŝi jam scias, ke li estis en malliberejo. Se vi demandus min pri li, mi diros, ke li aspektas inteligenta kaj kultura homo.

-Nur ŝajnas al vi – replikis lin Vesa. – Vi vidis lin eble du aŭ tri fojojn kaj vi jam asertas, ke li estas inteligenta kaj kultura.

-Bone – diris Petar. – Li tute ne interesas min, sed Nada estas la plej granda klaĉulino en la kvartalo. Pri ĉiuj ŝi ĉion scias kaj senĉese ŝi klaĉas. Eble vi forgesis kion ŝi rakontis al vi antaŭ jaroj. Ŝi asertis, ke mi havas amatinon kaj vi preskaŭ kredis ŝin. Mi ne deziras vidi ŝin kaj mi ne komprenas kial vi entute konversacias kun ŝi?

-Tamen ŝi estas helpema kaj ne forgesu, ke mi kaj ŝi estas kuzinoj. Ŝia avino kaj mia avo estis gekuzoj.

-Bone, bone –diris Petar. – Vi nur tion ripetas – gekuzojn. Ne gravas ĉu homoj estas parencoj, gravas ĉu ili estas bonaj aŭ ne.

Vesa iom koleriĝis al Petar.

“Stultaj virinoj, meditis li. Ili ne havas okupojn, tutan tagon klaĉas. Nun la najbaro estas la temo de iliaj klaĉoj.” Antaŭ kelkaj jaroj, kiam Petar estis bussōforo, ĉiutage multaj

homoj eniris kaj eliris el la aŭtobuso, kiun li ŝoforis kaj li spertis prijuĝi ĉu iu homo estas bona aŭ malbona. Vere li nur du aŭ tri fojojn vidis la novan najbaron, sed ŝajne li estas inteligenta kaj kultura viro, tute ne similis al krimulo. Tamen nun Petar iom enpensiĝis. Ofte la ekstera aspekto ne estas la plej fidinda. La eksteraĵo kaŝas la homan karakteron.

3.

La 15-an de aprilo

La aprilaj matenoj en Marino estis sunaj kaj serenaj. Nesentoble la vintro forpasis. Forpasis marto kun la siblaj ventoj, kiuj longe blovis de la maro, atakis la urbon kaj alportis majestajn ondojn. La grizaj nuboj malaperis. Kvazaŭ nevidebla mano kolektis kaj forportis ilin ien malproksimen. La ĉielo iĝis blua, diafana kiel senkulpa okulo infana. La suno pli forte brilis, varmigis la teron, en la kortoj la fruktaj arboj ekfloris kiel fianĉinoj en blankaj roboj. Unu post alia komencis aperi la floroj, kies buntaj koloroj: ruĝaj, flavaj oranĝaj, helviolaj, ornamis la bedojn, kvazaŭ pentristo faris belegajn mozaikojn.

Bonhumoro obsedis la homojn. La stratoj iĝis pli bruaj, pli viglaj, la kafejoj pli plenaj kaj en ili de matene ĝis vespere estis junuloj, maljunuloj, kiuj kafumis, babilis, atendante jam la someron, kiam en Marinon komencos veni ripozantoj.

La du urbaj hoteloj same jam estis pretaj por la ripozantoj. Iliaj posedantoj iom riparigis ilin, farbis la murojn, ŝanĝis iujn meblojn, ordigis la ĉambrojn.

Aprilo estis trankvila kaj agrabla, sed malbona novaĵo kiel raba birdo traflugis la urbon. Unue ne ĉiuj loĝantoj komprenis kio okazis, sed la famo ekvagis de homo al homo, de kafejoj al vendejoj kaj sur la stratoj oni maltrankvile demandis unu la alian:

-Ĉu vi jam aŭdis? Klara, la filino de doktoro Veselinov, malaperis. Jam du tagojn ŝi ne revenas hejmen. Neniu scias kie ŝi estas kaj kio okazis al ŝi. Oni serĉas, sed nenie trovas ŝin.

Klara estis lernantino en la dekunua klaso en la gimnazio. Ŝi lernis en urbo Burgo kaj ĉiun matenon kun Veronika, samklasanino, ŝi veturis buse tien. Marde matene je la sepa horo Klara eliris el la domo kaj ekveturis al la lernejo, sed posttagmeze ŝi ne revenis. Ŝia patrino, Darina, tuj telefonis demandi kie ŝi estas, sed la poŝtelefono de Klara ne funkciis. Darina ege maltrankviliĝis kaj kuris al la domo de Veronika demandi kio okazis.

La patrino de Veronika same serioze maltrankviliĝis, kiam Darina sonoritis ĉe la pordo de ilia domo kaj demandis:

-Saluton, Nina. Ĉu Veronika revenis de la lernejo?

-Jes. Ŝi estas hejme – respondis Nina.

-Ĉu hazarde Klara ne estas ĉe vi?

-Ne. Kial? – surpriziĝis Nina. - Ĉu okazis io?

-Hodiaŭ ŝi ne revenis de la lernejo kaj mi ŝatus paroli kun Veronika – diris Darina.

-Bonvolu.

Nina invitis Darina-n enen.

-Veronika estas en sia ĉambro kaj tuj mi vokos ŝin.

Post minuto Veronika venis kaj Darina per tremanta voĉo demandis ŝin:

-Veronika, hodiaŭ Klara ne revenis de la lernejo. Ĉu vi scias kio okazis? Vi estas amikinoj, ĉiutage vi kune iras al la lernejo. Ĉu vi ne veturis kune buse al Marino?

Veronika, knabino kun ege blanka vizaĝo, longaj nigraj haroj kaj okuloj kiel migdaloj, alrigardis Darina-n kaj iom embarasite diris:

-Mi kaj Klara eliris el la lernejo post la fino de la lernohoroj, sed ni ne ekiris kune al la bushaltejo. Klara diris, ke pli malfrue veturos al Marino.

-Kian okupon ŝi povus havi en Burgo? - demandis surprizite Darina.

-Mi ne scias. Ĝi nur diris, ke iom pli malfrue veturos al Marino.

-Dio mia! Mi provis kelkfoje telefoni, sed ŝia telefono ne funkcias kaj jam tri horojn ŝi ne revenas. Certe io malbona okazis. Klara ĉiam diras al mi, kiam ŝi malfruiĝos aŭ devas resti iom pli en Burgo, sed ĉi-matene nenion ŝi diris...

-Ne maltrankviliĝu – mildvoĉe diris Nina. – Mi certas, ke ŝi baldaŭ revenos. Ja, ŝi jam estas sufiĉe aĝa. Vi ne devas ĉiam kontroli ŝin. Vi scias, ke la knabinoj jam pensas pri amikoj kaj povas esti, ke en Burgo ŝi havas rendezuon kun iu knabo.

-Jes, sed ĝis nun Klara neniam menciis al mi pri knabo. Eble vere iu amindumas ŝin, sed mi estos pli trankvila, se mi sciis tion – preskaŭ plene diris Darina.

Ŝi silentis, streĉe rigardis antaŭ si, iom movigis lipojn, kvazaŭ flustris ion al si mem. En ŝiaj mielkoloraj okuloj estis timo kaj konfuzo. Darina ne sciis kion fari. Ankoraŭfoje ŝi demandis:

-Veronika, mi petas vin. Ĉu hazarde Klara ne menciis al vi nomon de iu knabo? Ĉu ŝi ne parolis pri rendezuo kun iu? Mi petas vin, rememoru bone. Eble vi konversaciis kun Klara pri knaboj. Ja, vi estas tre bonaj amikinoj...

-Neniam ni parolis pri knaboj kaj kun neniuj ŝi rendezuis – diris Veronika kaj alrigardis flanken. Ŝi kaŝis ion, sed ne eblis enpenetri ŝiajn pensojn.

-Mi estas tute embarasita – diris Darina kaj peze elspiris. – Kion mi faru? La sola espero estas, ke Klara telefonos. Povas esti, ke ŝi telefonos al vi, Veronika. Bedaŭrinde ŝia telefono daŭre ne funkcias – kaj Darina denove provis telefoni, sed nesukcese.

-Mi petas pardonon pro la ĝeno – diris ŝi al Nina. – Mi petas, se hazarde vi ekscios ion, bonvolu tuj telefoni al mi.

-Ĝis revido, Darina – diris Nina. – Mi certas, ke baldaŭ Klara revenos. Kredu. Vi ne devas malesperi. Ja pasis nur kelkaj horoj, ŝi nepre revenos.

Nina ĉirkaŭbrakumis Darina-n, akompanis ŝin al la korta pordo, longe staris kaj rigardis post ŝi. Darina iris malrapide, kvazaŭ surhavis sur la dorso sakon plenan je ŝtonoj. “Jes, diris al si mem Nina, malfacila estas la patrino sorto.”

Kiam Darina atingis la stratangulon, Nina turnis sin, eniris la domon kaj tuj iris al la ĉambro de Veronika. Veronika sidis ĉe la skribotablo kaj ion skribis. Nina ekstaris malantaŭ ŝi kaj serioze diris.

-Mi deziras paroli kun vi.

-Ni parolu poste. Nun mi skribas la hejman taskon pri matematiko.

-Ne! Ni parolos tuj! – firme diris Nina. – Rigardu min! Tre serioze mi demandas ĉu vi scias ion pri Klara. Ĉu ŝi havas amikon? Ĉu ŝi iris en lian domon? Ĉu ŝi kverelis kun la gepatroj kaj tial ne revenis hejmen? Diru! Vi certe scias ion.

-Nenion mi scias! – iom pli laŭvoĉe diris Veronika. - Mi kelkfoje ripetis - nenion mi scias! Kion vi deziras de mi?

-Veronika, tio, kio okazis estas serioza. Vi vidis la patrinon de Klara. Ŝi maltrankviliĝas. Mi petas vin, diru. Vi estas la plej bona amikino de Klara.

-Lasu min. Mi havas malfacilan hejman taskon kaj mi deziras finfari ĝin.

-Bone, tamen pripensu. Post jaroj vi estos patrino kaj tiam vi eksentos la patrinan doloron.

Nina eliris el la ĉambro de Veronika. Ŝi bone komprenis, ke Veronika kaj Klara estas en aĝo, kiam tre malfacile eblas konversacii kun ili. “Mi deziris, ke mi kaj mia filino estu amikinoj, meditis Nina, ke ni ĉion konfesu unu al alia, ni parolu sincere pri ĉiuj problemoj. Mia filino ne havu sekretojn de mi, mi sciu ŝiajn ĝojojn kaj malĝojojn, ŝiajn dolorojn, ŝi unue al mi diru ĉion, kio turmentas ŝin. Ŝi sincere rakontu al mi siajn timojn, dubojn kaj suspektojn. Jes, tion mi deziris, sed mi malsukcesis.

Mia filino ne estas mia amikino. Veronika kaŝas de mi siajn sentojn kaj neniel mi povas kompreni kion ŝi sentas, kion pensas, kion ŝi opinias pri mi. Veronika ne deziras konversacii kun mi. Ŝi preferas esti sola kun siaj problemoj, venkoj kaj malvenkoj. Inter ni estas abismo kaj mi ne trovas ponton por transiri tiun ĉi abismon.”

Nina estis instruistino en baza lernejo kaj en tiu ĉi momento ŝi sentis senreviĝon. “Ja, mi helpas la infanojn, kiujn mi instruas, sed mi ne povas helpi mian propran filinon. Por ŝi mi estas fremdulino. “

4.

Darina revenis hejmen, malfermis la pordon, eniris la ĉambron kaj apogis sin al la muro. Ŝi ne havis forton eĉ paŝon plu fari. Kiam Dobri, la edzo, vidis ŝin, tuj ekstaris.

-Kio okazis? Ĉu vi malbone fartas?

Darina ne respondis. Ŝia vizaĝo blankis kiel kreto kaj ŝiaj mielkoloraj okuloj, ofte ridantaj, nun naĝis en larmoj.

-Kion diris Veronika? – demandis Dobri.

-Nenion... - flustris Darina. – Post la fino de la lernohoroj Klara iris ien, sed kien – Veronika ne scias...

Darina plorĝemis. En la ĉambro regis silento. Aŭdiĝis nur la streĉaj ritmaj frapoj de la granda murhorloĝo. Dobri alrigardis la fenestron, tra kiu videblis la ĝardeno en la korto de la domo. Antaŭ la fenestro la malnova pruna arbo floris. “Printempas, meditis Dobri. Baldaŭ vesperiĝos, sed Klara ne venas.”

-Ni ne staru senpovaj! Ni faru ion! – diris Darina.

-Kion?

-Ni iru al la polico anonci, ke nia filino ne revenis hejmen.

-Eble ŝi revenos – hezite diris Dobri. – Ankoraŭ ne vesperiĝis...

“Ja, je la unua horo posttagmeze ŝi eliris el la lernejo kaj nun estis la sesa antaŭvespere, meditis Dobri.”

-Mi sentas, ke io terura okazis al ŝi. Ŝia poŝtelefono daŭre ne funkcias. Nenion ni scias... - plorĝeme flustris Darina.

-Ni ne pensu pri la plej malbona okazo – elspiris peze Dobri.

Ekstere nesentebles vesperiĝis. Nigra kurteno falis antaŭ la fenestro. Mallumo plenigis la ĉambron, sed nek Darina, nek Dobri ŝaltis la lampon. Ili staris unu kontraŭ la alia kaj inter ili estis kvazaŭ kilometroj, silentis, obseditaj de maltrankviligaj meditoj. Subite Darina haste diris:

-Ni iru al la policejo! Tuj! Ni ne povas plu atendi!

Rapide ili ekiris al la pordo. Sur la strato ambaŭ preskaŭ kuris.

La deĵoranta policano, antaŭ la urba policejo, vidante ilin maltrankvilaj kaj zorgpremitaj, tuj enkondukis ilin en la kabineton de la polica estro. Kiam Darina kaj Dobri eniris la kabineton, majoro Marin Tenev, la poliestro, ekstaris.

-Doktoro Veselinov, kio okazis? – demandis la majoro.

Li bone konis Dobri-n kaj Darina-n, ambaŭ kuracistoj en la urba hospitalo. Doktoro Dobri Veselinov – konata neŭrologo kaj doktoro Veselinova – pediatro. Antaŭ du jaroj la pli juna filo de majoro Tenev estis serioze malsana kaj Darina kuracis lin. Tenev estis tre dankema kaj ne forgesis la grandan helpon de doktoro Veselinova.

-Nia filino, Klara, ne revenis hejmen de la lernejo – diris Darina.

-Kiel? Kiam? – demandis la majoro embarasita.

Dobri kaj Darina rakontis al li, ke post la fino de la lernohoroj Klara ne revenis el Burgo. Ŝia poŝtelefono ne funkcias kaj nenion ili scias pri ŝi.

-Povas esti pluraj supozoj pri ŝia nereveno – komencis la majoro.

Kvardekjara, Tenev estis alta, forta kun densa nigra hararo, simila al erinacaj pikiloj kaj nigraj okuloj kun decidema rigardo.

-Mi komprenas – diris li. – Kiom jara ŝi estas?

-Dek ok – respondis Darina.

-Ĉu okazis, ke iam ŝi same ne revenis hejmen?

-Jes okazis, ke ŝi malfrue revenis – tuj diris Darina. –

Tamen ŝi ĉiam telefonis, ke malfruiĝos, sed hodiaŭ ŝi ne telefonis kaj nun ŝia poŝtelefono ne funkcias. Tio ege maltrankviligis nin!

-Ĉu ŝi havas amikojn, konatojn, parencojn en Burgo? Eble ŝi restis ĉe iu tie.

-Ŝi havas gesamklasanojn, kiuj loĝas en Burgo. Ni havas amikajn familiojn tie, sed ne eblas, ke Klara restis ĉe ili tranokti. Ili nepre telefonus al ni... - diris Dobri.

-Priskribu kio ĝuste okazis. Mi sendos la petskribon al la polico en Burgo. Kaj ni, kaj la polico en Burgo komencos serĉi ŝin.

Majoro Tenev donis al Dobri skribilon, paperfoliojn kaj Dobri komencis priskribi la okazintaĵon. Kiam li finis, la majoro tralegis ĝin kaj diris, ke morgaŭ informos ilin pri la komenco de la polica serĉado.

-Dankon, majoro Tenev – diris Dobri kaj Darina.

5.

La 16-an de aprilo

Burgo estis mara urbo sur la suda marbordo de la lando kun granda haveno kaj kelkcentmil da loĝantoj. Ŝipoj el diversaj mondpartoj alportis ĉi tien plurajn varojn. Ŝipoj same ekveturis de la burga haveno, plenaj je greno, ŝtofoj, kuraciloj... Multaj loĝantoj de la urbo laboris en la haveno.

Somere en Burgo oni povis vidi sennombrajn ripozantojn: enlandajn kaj eksterlandajn. Ĉe la urbo estis longa

strando kun mola orkolora sablo, pluraj hoteloj, bonaj restoracioj, kafejoj. Nun, en aprilo, ĉi tie regis vigleco. Sur la ĉefa strato, kiu gvidis al la maro, abundis kafejoj kun tabloj jam sur la trotuaroj, kaj ĉe ili - senzorgaj homoj. En la parko ĉe la maro promenadis maljunuloj, patrinoj kun infanoj kaj iuj el la infanoj ludis en la parka infanludejo. Agrable estis promeni ĉi tie en la serenaj matenoj, la arboj floris, la koloroj de la buntaj floroj karesis la okulojn, la maro similis al silka tolo.

La burga ĉefpolicejo, masiva kvinetaĝa konstruaĵo, troviĝis en la centro de la urbo. Ĉiun matenon je la oka horo komisaro Kalojan Safirov venis en la policejon, supreniris la dek ŝtupojn al la enirejo, salutis la deĵorantan policanon kaj ekpaŝis al sia kabineto.

Safirov laboris ĉi tie jam dudek kvin jarojn kaj parkere sciis kiom da ŝtupoj estas de la strato al la enirejo kaj poste kiom da paŝoj – de la enirejo al la kabineto sur la unua etaĝo – precize tridek kvin.

Ne tre alta, kun atleta korpo, Safirov havis bluajn okulojn kaj hararon kun koloro de matura tritiko. Antaŭ dudek kvin jaroj, kiam li finis juron en la universitato, tute ne supozis, ke estos policano, tamen onklo Vasil, poliestro, amiko de lia patro, proponis, ke Kalojan eklaboru ĉe la polico. Tiam onklo Vasil diris: “Vi finis juron. En la polico ni tre bezonas juristojn. Vi estas juna kaj la laboro plaĉos al vi. Ĝi estas ligita al multaj homoj. Vi esploros krimagojn kaj kiam vi sukcesos trovi la krimulon, tio estos por vi la plej granda kontentigo.”

Kalojan Safirov eklaboris ĉe la polico kaj li ne bedaŭris, ke iĝis policano. Kiel onklo Vasil diris dum tiuj jaroj, li konatiĝis kun multaj homoj kaj al pluraj el ili helpis.

Safirov sidiĝis ĉe la skribotablo kaj komencis trafoliumi la dokumentojn sur ĝi. El unu paperujo li elprenis foton de dekokjara knabino kaj dum iom da tempo atente rigardis ĝin. “Klara Veselinova, lernantino en 17-a gimnazio en Burgo, loĝanta en urbo Marino, malaperis la 15-an de aprilo.”

La knabino sur la foto estis bela kun longaj blondaj haroj kaj cejankoloraj okuloj. Kiam oni fotis ŝin, ŝi ridetis kaj ŝajnis al Safirov, ke neniam li vidis tian gajan, bonaniman rideton.

“Kio okazis, Klara, diris al si mem Safirov? Ĉu via malapero estas adoleska kaprico? Ĉu vi estis kolera al iu kaj tiel deziris montri, ke vi jam estas aĝa kaj memstara, aŭ al vi vere okazis akcidento? Nun mi kaj miaj kolegoj serĉos vin, tamen kie? Ĉu ni trovos vin? Kiel ĉiam necesas seriozaj klopodoj. Unue mi devas bone ekkoni vin, ekscii kiaj estis viaj kutimoj, kion vi ŝatis fari, kiuj estis viaj amikoj, kun kiuj vi kutimis renkontiĝi, ĉu vi estis emocia, ĉu hazarde vi ne havis malamikojn. Malfacilaj taskoj, kiujn mi devas solvi. De ie mi tamen komencu kaj kompreneble, mi komencos ĉe viaj gepatroj. Povas esti, ke ili estas la kialo de via malapero. Kiam adoleskuloj, kiel vi, konfliktas kun la gepatroj, ili malaperas, forkuras el la domo kaj tiel ili deziras puni la gepatrojn. Ĉu tion vi faris? Mi ankoraŭ ne scias. Mi provos diveni tion, malgraŭ ke mi bone komprenas, ke ne ĉiam la gepatroj inklinas konfesi, ke ili konfliktis kun sia infano. Do, mi unue devas ekscii kiaj estas viaj gepatroj.”

Safirov elprenis la poŝtelefonon kaj telefonis al majoro Tenev en Marino.

-Saluton, majoro – diris Safirov. – Ĉu estas iu novaĵo pri Klara Veselinova? Ĉu hazarde ŝi revenis?

-Ne – respondis Tenev. – Jam du tagojn de ŝi ne estas eĉ spuro. Ŝi kvazaŭ dronis en la maro.

-Ankaŭ tio eblas – diris Safirov. – Mi deziras paroli kun ŝiaj gepatroj. Bonvolu diri al ili, ke hodiaŭ je la kvara horo posttagmeze ili venu al la ĉefa policejo en Burgo.

-Bone, sinjoro komisaro. Mi diros al ili. Mi esperas, ke vi ricevis la foton de Klara, kiun mi sendis al vi.

-Jes, dankon. Mi bonorde ricevis ĝin kaj ĝi estas antaŭ mi, sur la skribotablo. Ĝis reaŭdo.

-Ĝis – diris Tenev.

Safirov daŭrigis trafoliumi la dokumentojn.

“Klara, Klara, ne estas nur vi. Mi havas aliajn taskojn, sed nun mi okupiĝos nur pri vi. Vi estas juna, la tuta vivo estas antaŭ vi kaj mi devas trovi vin. Mia filino, Greta, estas preskaŭ samaĝa kiel vi kaj mi bone komprenas kiel fartas nun viaj gepatroj. Vi estas la sola ilia infano kaj certe ili jam frenezigiĝis. Eĉ por momento ili ne povas imagi, ke vi malaperis kaj ili atendas vin, esperante, ke subite vi revenos. Ni, la gepatroj, deziras havi infanojn, ni sopiras infanojn kaj ni ne supozas kiom da problemoj povus kaŭzi al ni niaj infanoj. Por ni la infanoj estas granda trezoro. Por ili ni pretas al ĉio, eĉ iri al la infero, por ke niaj infanoj estu feliĉaj. Tamen ofte ili ne komprenas niajn zorgojn kaj postulas de ni pli ol ni povus doni al ili. Ni tamen ĉiam pardonas iliajn deliktojn.”

Safirov ekstaris kaj iom promenis en la kabineto. Krom skribotablo kun komputilo en ne tre vasta ĉambro estis librobretaro kaj ŝranko kun paperujoj. Antaŭ la skribotablo staris du foteloj, en kiuj sidis la personoj, kiujn li pridemandis. Safirov iris al la fenestro, rigardis la straton, kiu estis unu el la grandaj urbaj stratoj. Maljunuloj, junuloj iris tien. Iuj tre lante, aliaj rapidis, preskaŭ kuris, ĉiuj kun siaj problemoj kaj zorgoj. Kaj tiuj multaj homoj ne sciis, ke en la urbo iu knabino malaperis, ke ŝiaj gepatroj jam du tagnoktojn ne dormis kaj maltrankvile atendas la revenon de sia filino.

Je la kvara horo la deĵoranta policano ĉe la enirejo de la policejo telefonis al Safirov, ke gesinjoroj Veselinovi alvenis.

-Mi atendas ilin – diris Safirov. – Bonvolu akompani ilin al mia kabineto.

Post du minutoj la kabineton eniris Darina kaj Dobri. Safirov alrigardis ilin. Darina, la patrino de Klara, ĉirkaŭ kvardekjara, estis alta kun harmonia korpo, vestita en ĉokoladkolora jako kaj kaŝtankolora jupo. Ŝia blonda hararo estis longa kaj densa kaj ŝiaj okuloj havis neordinaran mielkoloron. Dobri, la edzo, eble estis du aŭ tri jarojn pli aĝa ol

ŝi kun lipharoj kaj okulvitroj. Lia nigra hararo jam iom arĝentis, la okuloj estis helverdaj kun maltrankvila kaj konfuzita rigardo.

-Bonan tagon, sinjoro komisaro – salutis ili.

-Bonan tagon. Bonvolu sidiĝi – kaj Safirov montris la du fotelojn antaŭ la skribotablo.

Darina kaj Dobri sidiĝis.

-Do – komencis li. – Jam de du tagoj via filino, Klara, malaperis. Ni serĉas ŝin, sendis ŝian foton al la kvartalaj policejoj, al la najbaraj urboj kaj vilaĝoj, sed ni ne ricevis informojn pri ŝi. Evidente necesas pli insista serĉado. Tamen mi ŝatus starigi kelkajn demandojn al vi.

Darina kaj Dobri rigardis unu la alian kaj poste Safirov.

-Vi scias – daŭrigis la komisaro, – ke la adoleskuloj estas tre sentemaj. Ili strebas memstariĝi, deziras mem decidi pri sia vivo. Ĉu hazarde okazis konfliktoj inter vi kaj Klara? Povas esti, ke ia konflikto igis ŝin forlasi la domon kaj kaŝi sin ie.

Post iom da silento Darina emocie reagis:

-Sinjoro komisaro, la rilatoj inter ni kaj Klara estis tre bonaj. Neniam ni riproĉis, ĝenis aŭ mallaŭdis ŝin. Ni ne havis konfliktojn nek kun ŝi, nek en la familio. Nia familia vivo ĉiam estas trankvila. Klara estas bone edukita, neniam estis ofenda al ni.

-Ĉu iu el vi ambaŭ havis konfliktojn kun iuj personoj? Vi estas kuracistoj kun multaj pacientoj kaj eble iu paciento estis malkontenta pri vi? Ĉu vi ŝuldas al iu grandan monsumon? Eble iu perforte forkondukis Klara-n kaj nun ŝi estas enfermita ie?

Darina ekploris, elprenis tukon kaj komencis viŝi la larmojn, kiuj ekfluis sur ŝiajn vangojn. Dobri provis trankviligi ŝin:

-Ne ploru. La sinjoro komisaro nur supozas, ke tio povus okazi...

Poste Dobri komencis klarigi:

-Ne. Kun neniu persono ni konfliktis. Niaj pacientoj estimas nin. Al neniu ni ŝuldas monon – diris li kaj en lia voĉo sentebliis, ke tiu ĉi demando iom ofendis lin.

-Vi estas riĉaj, havas grandan elegantan domon en Marino, vilaon en la ripozejo “Lazura Maro”, ofte vi ekskursas eksterlanden. Ĉu eblas, ke iu aŭ ia bando perforte forkondukis Klara-n kaj planas ĉantaĝi vin pro mono? Ĉu post la malapero de Klara iu telefonis al vi? – demandis Safirov.

-Ne. Ĝis nun neniu telefonis – time respondis Darina.

-Se iu telefonos, vi tuj devas informi min.

-Jes, kompreneble – diris Dobri.

Safirov rigardis al la notlibreto, kiu estis antaŭ li, iom meditis, skribis ion en ĝin kaj poste denove demandis:

-Ĉu Klara konfliktis kun iu, samklasano, amiko? Ĉu iu malamis ŝin?

-Tute ne! Ŝi estas tre bonkora. Kun neniu ŝi kverelis – diris Darina.

-Mi scias, ke la demandoj povas ŝajni ofendigaj, sed mi nepre devas starigi ilin – klarigis Safirov. - Ja, estas diversaj homoj, psike malsanaj kaj ili nur pro unu ofenda vorto povus damaĝi Klara-n. Vi, doktoro Veselinov, bone konas similajn homojn, vi estas neŭrologo, la homaj karakteroj estas diversaj, ĉu ne?

-Jes. Diversaj homoj, diversaj karakteroj. Iuj – tre kruelaj, sen kialo emas damaĝi iun – mallaŭte diris Dobri.

-Nun mi devas iom pli bone ekkoni Klara-n – daŭrigis Safirov. - Kio estis ŝia ŝatata okupo?

-Legi. Kiam estis libera, ŝi nur legis. Klara verŝajne tralegis ĉiujn beletrajn librojn en la urba biblioteko de Marino – diris Dobri. – Jam de la infaneco ŝi multe legas.

-Ŝi tre ŝatis birdojn - aldonis Darina. - Vi scias, ke proksime al Marino troviĝas birdrezervejo kaj Klara ofte estis tie, observis la diversspecajn rarajn birdojn. Tie, proksime al Marino, pasas la fama vojo Via Pontika de la migraj birdoj de Eŭropo al Azio.

-Literaturo estas ŝia ŝatata studobjekto – menciis Dobri.

-Ŝia klasestro, sinjoro Drakov, – diris Darina, - kiu instruas literaturon, diris, ke Klara estas la plej bona lernantino pri literaturo. Ŝi verkis interesajn eseojn. Mi suspektas, ke ŝi verkis ankaŭ poemojn, sed neniam montris ilin al mi. Ŝi kaŝis ilin.

-Ĉu vi legis ŝiajn eseojn kaj kion ŝi esprimas en ili? – turnis sin al Darina Safirov.

-Bedaŭrinde ne – respondis ŝi. – Mi ne legis ŝiajn hejmtaskojn. Klara estis tre memstara kaj ne petis helpon de ni, kiam skribis la hejmtaskojn.

-Kiu estis ŝiaj geamikoj? Kun kiuj Klara kutimis renkontiĝi?

-Neniam ŝi menciis al ni kiuj estas ŝiaj geamikoj, kun kiuj ŝi renkontiĝas – diris Dobri.

-Ĉu ŝi kutimis viziti dancklubejojn kaj malfrue revenis hejmen?

Darina ne deziris diri al la komisaro, ke de tempo al tempo Klara iris al Burgo, estis en dancklubejoj kaj poste malfrue vespere revenis hejmen. “Ne. Pli bone mi ne diru tion, decidis Darina.”

-Foje, foje, kiel ĉiu knabino je ŝia aĝo, Klara estis en dancklubejoj – diris Dobri kaj Darina iom riproĉe alrigardis lin.

-Kiujn dancklubejojn ŝi vizitis? Ja, en Burgo estas kelkaj famaj dancklubejoj – demandis Safirov.

-Mi ne scias, neniam mi demandis ŝin en kiu dancklubejo ŝi estis – respondis Dobri.

-Ĉu Klara havas koramikon?

Darina iom mire alrigardis Safirov-on.

-Tion same mi ne scias. Klara neniam diris al mi, ke iu knabo plaĉas al ŝi aŭ ke ŝi havas koramikon – diris ŝi. – Mi evitis paroli kun ŝi pri intimaj problemoj. Ja, ŝi estas tre juna, lernantino en dekunua klaso, nur dekokjara ŝi estas.

Dum Darina parolis, Dobri meditis, ke li kaj Darina preskaŭ ne konas Klara-n. Ili ne scias kiuj estas ŝiaj geamikoj,

en kiun dancklubejon ŝi iris aŭ ĉu estis en dancklubejo aŭ alie, kiam fojfoje vespere ŝi venis en Burgon. Nun Dobri konsciis, ke li tre malofte konversaciis kun Klara. Li ne sciis kion ŝi sentas, kio plaĉis al ŝi, kion ŝi deziras, pri kio ŝi revas, kia profesio allogas ŝin. “Mi ĉiam estis tre okupata, ofte malfrue vespere mi revenis hejmen kaj preskaŭ ne havis tempon esti kun Klara, konversacii kun ŝi. Eble ŝi sentis bezonon iam diri ion al mi, sed ŝi vidis, ke mi ne tro interesiĝas pri ŝi. Kiam Klara estis infano, mi pli ofte estis kun ŝi. Ni ludis, promenadis, ŝi ĉiam deziris esti kun mi, sed poste, kiam ŝi iĝis pli aĝa iel nesentoble ni malproksimiĝis. Kaj nun jam estas malfrue serĉi vojon unu al alia, diris al si mem Dobri.”

-Je tiu ĉi aĝo la knabinoj havas unu bonan amikion, al kiu konfesas iujn siajn sekretojn. Ĉu Klara havis tian amikion? – demandis Safirov.

-Jes – tuj respondis Darina. – Ŝia la plej bona amikino estas Veronika. Ili lernas en la sama klaso. Veronika loĝas proksime al nia domo, ni estas preskaŭ najbaroj. Klara kaj Veronika konas unu la alian jam de la infaneco. Ili kune lernis en la baza lernejo.

-Tre bone. Bonvolu doni al mi la adreson de Veronika.

Darina diktis la adreson kaj Safirov skribis ĝin en la notlibreton.

-Ni devas vidi la komputilon de Klara – diris Safirov. – Eble el ĝi ni sukcesos ekscii ion plian pri ŝi. Bedaŭrinde ŝian poŝtelefonon ni ne povas vidi. Ja, ĝi jam de la unua tago de ŝia malapero ne funkcias. Mi dankas al vi. La konversacio estis utila kaj mi esperas, ke ĝi helpos por la serĉado de Klara. Kiam mi havos informojn pri ŝi, mi tuj telefonos.

Safirov ekstaris por adiaŭi Darina-n kaj Dobri-n.

-Ĝis revido, sinjoro komisaro. Ni dankas vin – diris ili.

6.

Jam tri jarojn Kalojan Safirov kaj Rumen Kolev laboris kune. Ilia ĉefa tasko estis la serĉado de homoj, kiuj subite kaj neatendite malaperis. Kiam la ĉefo de la polico, Toma Rikov, vokis Safirov-on kaj diris al li, ke serĝento Rumen Kolev estos lia kolego, Safirov tute ne kontentis. Li ne konis Kolev-on kaj kiam antaŭ li ekstaris la dudekkvarjara junulo, la unua penso de Safirov estis, ke tiu ĉi junulo ne povos plenumi la komplikajn taskojn.

Rumen Kolev estis alta, sed maldika kun flavruĝa hararo kaj okuloj, pri kiuj oni ne povis precize diri ĉu estas bluaj aŭ grizaj.

La unuaj demandoj de Safirov al Kolev estis:

-Serĝento Kolev, kie vi naskiĝis?

-En vilaĝo Poplo.

-Kion vi studis?

-Unue mi lernis en la baza lernejo en la vilaĝo, poste en gimnazio en Burgo kaj mi finis la Polican Altlernejon.

-Ĉu vi edziĝis?

-Ankoraŭ ne – respondis Kolev.

-Mi diros al vi, ke se vi laboros en tiu ĉi fako, vi ne povos edziĝi. Vi ne havos tempon konatiĝi kun junulino aŭ se vi hazarde konatiĝos kun iu junulino, vi kaj ŝi ne estos multe kune, ĉar ŝi malofte vidos vin pro via ĉiutaga okupateco kaj rapide ŝi forlasos vin.

Kompreneble Rumen Kolev nenion respondis. Li nur rigardis kaj aŭskultis Safirov-on.

Jam en la unua semajno, kiam Kolev kaj Safirov kune eklaboris, venis sciigo, ke dekkvinjara knabino malaperis. Ili tuj komencis la serĉadon kaj Safirov komprenis, ke lia pritakso pri Kolev okazis malĝusta. Kolev estis el tiuj homoj, kiuj tute dediĉis sin al la laboro. Li pridemandis plurajn personojn: parencojn, konatojn de la malaperinta knabino, traveturis la

regionon, renkontiĝis kun policianoj en la najbaraj urboj kaj vilaĝoj kaj trovis la knabinon.

Okazis, ke ŝi ne deziris lerni, forkuris de la domo kaj ekloĝis en la domo de sia fianĉo en malproksima, malgranda vilaĝo. Loka policano, kiu estis informita de Kolev, vidis ŝin tie kaj tiel la knabino estis trovita.

Nun, kiam Safirov kaj Kolev ricevis la taskon serĉi Klara-n, ili kune pridiskutis ĉiujn eblojn: ĉu Klara forkuris el la domo, ĉu iu forkondukis ŝin por ĉantaĝi ŝiajn gepatrojn aŭ ĉu oni perforte veturigis ŝin eksterlanden por ŝin prostitui.

Kolev tuj komencis esplori ĉiujn eblojn. Iu el la sekretaj informantoj de la polico sciigis lin, ke en loĝejo en multetaĝa domo estas kelkaj suspektindaj junulinoj. Kolev kun tri policianoj iris tien. La domo, deketaĝa, antaŭnelonge konstruita, troviĝis proksime al la ĉemara parko. La loĝejo, pri kiu temis, estis sur la oka etaĝo. Kolev kaj la policianoj supreniris per la lifto kaj sonoris ĉe la pordo de la loĝejo. Neniu malfermis la pordon, sed estis klare, ke ene estas homoj. Post kelkfoja sonoro Kolev decidis disrompi la pordon. Li kaj la policianoj disrompis ĝin, eniris la loĝejon kaj okazis, ke estas bordelo.

Oni perforte devigis kelkajn junulinojn sin prostitui kaj la loĝejon vizitis riĉuloj, inter kiuj estis konataj urbanoj. Tie tamen ne estis Klara. Kolev supozis, ke Klara, kiu estis bela kaj alloga, eble same estis perforte devigita sin prostitui.

Kiam Kolev raportis al Safirov pri la okazintaĵo, Safirov konkludis, ke por la serĉado de Klara necesas pli bone organizi la agadon.

-Dum la lastaj jaroj pluraj junulinoj estis perforte veturigitaj eksterlanden por sin prostitui – diris Safirov. – Estas bandoj, kiuj okupiĝas pri tio. Ni devas esplori ĉu simila bando ne forkondukis Klara-n. Ni eksciu kiuj estis ŝiaj konatoj kaj kiajn personojn ŝi kontaktis. Ni devas bone esplori ŝiajn kutimojn kaj vivmanieron. Ŝi estas juna, tamen ni ne forgesu, ke junulinoj kiel ŝi havas multajn ligojn ĉefe pere de interreto.

La tasko de serĝento Rumen Kolev estis iri en la domon de familio Veselinovi kaj trarigardi la komputilon de Klara, ŝiajn kajerojn, notlibretojn kaj taglibron, se ŝi havas taglibron.

Estis la oka matene, kiam Kolev ekveturis al Marino. En tiu ĉi urbeto, proksima al Burgo, li estis nur dufoje. La unuan fojon li venis ofice. Tiam knabo, loĝanta en Marino, ŝtelis cigaredojn el vendejo en Burgo, kaj Kolev devis renkontiĝi kaj paroli kun la gepatroj de la knabo. La duan fojon li venis ĉi tien ĉe la strando. Estis belega aŭgusta tago. Ĉe Marino la golfo estis granda kaj tial ĉi tie la maro preskaŭ ĉiam estis trankvila. La mara akvo tiel diafanis, ke videblis la etaj fiŝoj, kiuj naĝis, proksime al la bordo. Kolev tre bone memoris tiun ĉi dimanĉan tagon, kiun li pasigis sur la strando de Marino.

Nun li denove venis al Marino. La domo de familio Veselinovi estis trietaĝa en vasta korto. Jam antaŭe Kolev rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj domoj en Marino estis du- aŭ trietaĝaj. Ĉi tie loĝis riĉaj homoj, kiuj havis luksajn domojn. Iuj el la loĝantoj estis juristoj, aliaj inĝenieroj aŭ kuracistoj, kiel geedzoj Veselinovi. Multaj laboris en Burgo kaj loĝis ĉi tie, ĉar la urbeto, silenta kaj trankvila, pli similis al ripozejo ol urbo.

Kolev eniris la korton de Veselinovi, proksimiĝis al la domo, sonoris kaj post kelkaj minutoj Darina malfermis la pordon.

-Bonan tagon – salutis li. – Mi estas serĝento Rumen Kolev. Komisararo Safirov ordonis al mi veni trarigardi la komputilon de Klara, ŝiajn kajerojn, notlibretojn, kiuj verŝajne direktus nin al iu spuro pri ŝia malapero.

Darina alrigardis lin. Kolev estis maldika kun flavruĝa hararo kaj grizaj aŭ eble bluaj okuloj.

-Bonvolu – diris ŝi. – Mi ne fartas bone, mi malsaniĝis kaj estas sola hejme, mia edzo laboras, sed mi helpas vin, mi montros ĉion, kion vi deziras vidi.

Ŝia vizaĝo similis al velkinta arbofolio kaj pro la ĉagreno kaj doloro, ŝi aspektis laca kaj senforta. Ĉirkaŭ ŝiaj

okuloj estis malhelaj ombroj kaj ĉe la tempioj - sulkoj kiel reto. Darina paŝis malrapide kaj iom ŝanceliĝis.

-Ni iru al la ĉambro de Klara – diris ŝi kaj ekiris sur la ŝtuparon al la dua etaĝo de la domo.

Ŝi malfermis la pordon de unu el la ĉambroj kaj ili eniris. Ĉambro, ne vasta, kun granda fenestro al la maro. Rava pejzaĝo, kvazaŭ la maro estas antaŭ la fenestro. En la ĉambro – lito, skribotablo, librobretaro, eta ŝranko, vestoŝranko...

-Ĉio ĉi tie estas tiel, kiel Klara postlasis ĝin – dolorvoĉe diris Darina. – Nenion mi prenis, nek movis.

Kolev alrigardis atente la ĉambron. Sur la librobretaro estis eta pluŝa blanka urseto. Darina rimarkis, ke li rigardas la urseton kaj diris:

-Ĝi estis la plej ŝatata ŝia urseto.

Sur la lito, ĉe la kuseno, kuŝis libro, kiun Klara eble legis kaj lasis ĉi tie. Sur la skribotablo estis komputilo kaj ĉe ĝi kajero kun verdaj kovrilpaĝoj. Ĉe la kajero kelkaj paperfolioj, sur kiuj estis skribitaj matematikaj formuloj. Kolev trafolumis la kajeron. En ĝi estis matematikaj taskoj.

-Mi vidos la komputilon – diris li.

-Bone.

Kolev ŝaltis la komputilon. Feliĉe ne estis pasvorto kaj li povis trarigardi la dosierojn. Unu post alia li malfermis ilin kaj legis ilian enhavon. En pluraj el la dosieroj estis lecionoj, kelkaj eseoj, verŝajne hejmaj taskoj, kiujn Klara verkis. Estis notoj pri diversaj dietoj, biografioj kaj fotoj de famaj rokmuzikistoj. Nenio, kio povis direkti la atenton pri io, ligita al la subita malapero de Klara.

Post la trarigardo de la dosieroj, Kolev provis malfermi la retpoŝtilon de Klara, sed li bezonis la pasvorton.

-Ĉu vi scias la pasvorton de la retpoŝtilo – demandis li Darina.

-Ne. Neniam mi scivolis kun kiu korespondas Klara, al kiu ŝi skribas leterojn kaj de kiu ŝi ricevas leterojn – diris ŝi.

Kolev provis diversajn pasvortojn, sed ne sukcesis malfermi la poŝton.

-Pri la retroŝtulo ni devas uzi la sperton de niaj specialistoj – diris li.

Post la komputilo li malfermis la tirkestojn de la skribotablo, sed en ili estis nur skribiloj, kraĵonoj, tondilo... Li ekstaris kaj iris al la librobretaro. Sur la bretoj estis libroj, lernolibroj, kajeroj. Kolev komencis atente trafoliumi ilin. Ĉe la librobreto staris eta ŝranko kaj li malfermis ĝin. En ĝi estis blankaj paperfolioj, malnovaj revuoj pri modo kaj numero de la literatura revuo “Flamo”. Inter la revuoj kaj la ĵurnaloj, en la angulo de la ŝranketo Kolev rimarkis notlibreton kun kartona kovrilo. Li prenis kaj malfermis ĝin. Sur la unuaj paĝoj manskribite estis sentencoj de filozofoj kaj verkistoj kaj Kolev komencis legi ilin. “*La amo ridas en la songoj kaj ploras, kiam vekigas.*” Pitagoro, “*Esti enamiĝinta, signifas esti freneza*” Ovidio, “*Ami kaj esti amata estas la plej granda feliĉo en la mondo*” Henriko Hajne.

Post la sentencoj estis versaĵo, verŝajne verkita de Klara. Kolev eklegis ĝin.

*Vi estas mia okulo al la mondo,
vi estas mia lumo en la nokto.
Vi kiel vino ebriigas min,
kiel Drako vi flamigas min.
Kiam kontempladas mi la maron,
vidas vian helrigardon.
Kiam susuras la arbofolioj,
mi aŭdas vian voĉon.
Kiam la vento karesas min
mi sentas la varmon de viaj manplatoj.*

Tiu ĉi versaĵo vekis la atenton de Kolev. Certe estis, ke Klara dediĉis ĝin al iu kaj per ĝi ŝi esprimis sian amon.

-Tiun ĉi notlibreton mi prenos – diris Kolev al Darina. – Ni devas iom pli detale esplori ĝin.

-Mi ne sciis pri ĝi – Darina alrigardis la notlibreton. - Kion Klara skribis en ĝi?

-Estas sentencoj pri la amo kaj ampoemo – respondis Kolev.

-Mi supozis, ke ŝi kaŝe verkas poemojn, sed neniam ŝi montris, nek legis iun poemon al mi.

-Bonvolu – kaj Kolev donis la notlibreton al Darina.

Ŝi komencis legi la sentencojn kaj la poemon.

-Kion vi opinias? Al kiu Klara dediĉis tiun ĉi versaĵon? – demandis Kolev.

-Mi ne scias. Mi eĉ ne supozis, ke ŝi estas enamiĝinta. Mi ĉiam opiniis, ke Klara estas ankoraŭ infano kaj la amsentoj ankoraŭ ne obsedis ŝin – diris Darina.

-Gepatroj ne rimarkas kiam siaj infanoj iĝas plenkreskaj kaj kiam obsedas ilin la amsentoj. Kiel rapide ili ŝanĝiĝas! Kiom multaj detaloj el ilia vivo la gepatroj ne scias. Por gepatroj ofte infanoj vivas en fermita mondo, en kiun ne povas eniri – diris Kolev.

-Nun mi bedaŭras, ke mi ne sukcesis pli bone ekkoni mian Klara-n – ĝemsuspiris Darina. – Eble mi devis esti pli proksime al ŝi. Mi kulpas pri ŝia malapero.

-Vi ne estas kulpa – diris Kolev. – Ĉiuj gepatroj estas tiaj. Eĉ se ili strebas pli bone ekkoni siajn infanojn, ili ne sukcesas. La infanoj vivas en fermitaj mondoj, ŝlositaj ĉambroj kaj oni ne havas la ŝlosilojn por malfermi ilin.

-Eble vi pravas – mallaŭte diris Darina.

-Mi dankas vin – diris Kolev. – Ni telefonos kaj informos vin pri la serĉado de Klara. Eble ŝi estas kun tiu, al kiu ŝi dediĉis la versaĵon kaj verŝajne ni baldaŭ trovos ilin.

Darina akompanis Kolev-on al la pordo kaj adiaŭis lin.

7.

Kalojan Safirov ekveturis por renkontiĝi kun Veronika, la amikino de Klara. Nur ŝi povis diri ĉu antaŭ la malapero, Klara estis maltrankvila, ĉu rapidis ien renkontiĝi kun iu. Safirov konsciis, ke la konversacio kun Veronika devas esti atenta kaj iamaniere li instigu ŝin al sincera senpera konversacio. Tial li ekveturis al Marino sola, ĉar se li estus kun iu, Veronika maltrankviliĝus kaj ne kuraĝus paroli.

La aŭto de Safirov ne estis nova, “Peĵo”, sed dank’ al ĝi li veturis al la urboj kaj vilaĝoj en la regiono de Burgo.

Larĝa, glata estis la aŭtovojo al Marino. Dekstre videblis la granda Burga lago – maldekstre la maro, kies senlima blueco karesis la rigardon. La akvo de la lago ne estis sala, en ĝi naĝis anasoj kaj sur la etaj insuloj sidiĝis cikonioj. Proksime estis birdrezervejo kun raraj birdoj, kiun menciis la patrino de Klara. De la aŭtovojo videblis la alta turo de kie eblis observi la birdojn.

Delonge Safirov ne estis en Marino kaj nun kontentis, ke denove vidos la urbeton, kiu tre plaĉis al li. Proksime al Burgo ne estis alia silenta kaj trankvila urbeto kiel Marino. En ĝi la domoj, ĉefe familiaj, havis grandajn kortojn, kiuj printempe, somere kaj aŭtune dronis sub la ombroj de fruktaj arboj. Sur la stratoj ne estis tumulto kaj vigla trafiko, la loĝantoj aspektis kvietaj, trankvilaj kaj gastamaj. La strando allogis, sed somere ĉi tien ne venis multaj ripozantoj.

Kiam Safirov pli junis, li revis konstrui en Marino vilaon, sed tio restis nur bela revo, ĉar neniam li sukcesis havi tiom da mono por komenci la konstruadon. En la revoj tamen li daŭre vidis duetaĝan vilaon, blankan kiel maran laron, kun ne granda korto, kelkajn fruktajn arbojn, multajn florojn, ĉar lia edzino, Mila, tre ŝatis florojn. Safirov eĉ revis, ke en la korto de la vilao ludos liaj genepoj, malgraŭ ke lia filino Greta estis ankoraŭ lernantino kaj neniu dirus kiam ŝi edziniĝos kaj ĉu li havos genepojn.

Nesentebles la aŭto eniris Marinon. Safirov malrapidigis ĝin, trapasis la ĉefan straton, direktiĝis dekstren, kie estis strato "Roza Valo", vidis numeron 21 sur la korta pordo de iu el la domoj kaj haltigis la aŭton. La domo estis trietaĝa, helverde farbita kaj sur la dua kaj tria etaĝoj estis vastaj balkonoj. En la korto staris garaĝo. Certe la familio havis unu aŭ du aŭtojn.

Safirov eliris el la aŭto, trapasis la korton kaj sonoritis ĉe la pordo. Post iom da tempo la pordon malfermis simpatia virino, ĉirkaŭ kvardekjara, nigrahara kun okuloj, similaj al aveloj.

-Bonan tagon – salutis Safirov. – Vi verŝajne estas sinjorino Kambova, la patrino de Veronika. Ni parolis telefone. Mi estas komisaro Kalojan Safirov kaj venas konversacii kun Veronika pri Klara Veselinova.

-Jes – diris Nina. – Ni atendas vin. Bonvolu.

Safirov eniris la domon.

-Mi tuj vokos Veronika-n – diris ŝi kaj iris al la dua etaĝo de la domo.

Post nelonge Nina kaj Veronika venis.

-Bonan tagon, sinjoro – salutis lin Veronika.

Safirov alrigardis ŝin. Ne tre alta, maldika kun longaj nigraj haroj, ŝi havis grandajn brunkolorajn okulojn.

-Bonan tagon – diris Safirov. – Sinjorino Kambova – li turnis sin al Nina. – Mi ŝatus nur duope paroli kun Veronika. Nia konversacio estos diskreta kaj mi pardonpetas.

-Mi bone komprenas vin, sinjoro komisaro – diris Nina. – Vi povus konversacii en la gasteĉambro, mi ne ĝenos vin – kaj ŝi montris la gasteĉambron.

Safirov kaj Veronika eniris ĝin. Estis moderne meblita ĉambro kun pezaj, masivaj foteloj, granda libroŝranko, nova televidilo, vitra kafotablo kaj kanapo. Sur la muroj pendis du maraj pejzaĝoj. Unu el ili montris la maran bordon, sude de Marino, kie rivero Felia enfluas la maron. Tre pitoreska, ekzotika loko kun multaj lilioj.

La supozo de Safirov, ke la familio estas riĉa, konfirmiĝis kaj li demandis al Veronika kiun laboron faras ŝiaj gepatroj.

-Paĉjo posedas firmaon por ellaboro de mebloj – diris ŝi. – Ĉi tie la kanapo, la foteloj kaj la libroŝranko estas faritaj en lia firmao.

-Kaj la patrino?

-Ŝi estas instruistino en la baza lernejo en Marino.

-Vi estas filino de instruistino – diris Safirov. – Mi ege estimas instruistojn. Tre belajn rememorojn mi havas de miaj geinstruistoj, kiam mi estis lernanto. Nun vi lernas en Burgo kaj vi estas samklasano de Klara.

-Jes.

La pordo de la ĉambro malfermiĝis, eniris Nina kaj alportis kafon kaj biskvitojn.

-Mi petas pardonon, tamen mi opiniis, ke unu kafo estos bone por freŝigi vin – diris ŝi kaj metis la glaseton kaj la teleron kun la biskvitoj sur la kafotablon.

-Dankon. Mi tre ŝatas kafon – diris Safirov.

Kiam Nina eliris li daŭrigis la konversacion kun Veronika.

-Vi kaj Klara estas bonaj amikinoj, ĉu ne? Ĉiutage vi estis kune. Post la fino de la lecionoj vi same estis kune kaj ŝiaj gepatroj diris al mi, ke vespere vi iris al Burgo por danci. En kiun dancklubejon vi iris?

-Ni ofte estis en “Nimfo”, proksime al la haveno – respondis Veronika.

-Mi bone konas tiun ĉi dancklubejon. Fojfoje tie la gejunuloj kverelas kaj batas unu la alian. Ĉu vi ne timis iri tien?

-Knaboj batas unu la alian. Ni estas en kompanio kaj nekonataj knaboj ne kuraĝis ĝeni nin – diris Veronika.

-Kaj kiuj estas en via kompanio? – demandis Safirov.

-Klara, mi, Filip, al kiu Klara plaĉas, mia amiko, Ivo, Stojan – amiko de Filip, Nora.

-Granda kompanio ĝi estas – rimarkis li.

-Kiu estas Filip? Ĉu li lernas en la sama lernejo, en kiu vi lernas?

-Filip estas pli aĝa ol ni, laboras ĉe la haveno, estas gruisto– klarigis Veronika.

-Ĉu Filip kaj Klara renkontiĝas?

-Filip ofte atendas Klara-n antaŭ la lernejo, sed li estas tro impertinenta kaj ĵaluza.

-Ĉu Filip iam minacis Klara-n? – demandis Safirov.

-Jes, li diras al ŝi: “Vi estos mia kaj al neniu alia.”

Kelkfoje Vlad, nia najbaro, per sia aŭto veturigis nin matene al Burgo. Foje mi estis malsana kaj Vlad veturigis nur Klara-n. Poste Klara diris al mi, ke kiam Vlad haltigis la aŭton antaŭ la lernejo, tie estis Filip. Li vidis, ke Klara eliras el la aŭto de Vlad, faris grandan skandalon, ke Klara estis en la aŭto de viro kaj minacis ŝin. Post tago Filip denove venis en la lernejon kaj petis Klara-n pardoni lin.

-Kiam lastfoje vi vidis Klara-n? – demandis Safirov.

-Antaŭ tri tagoj. Post la fino de la lecionoj ni kune eliris el la lernejo. Klara diris, ke pli malfrue veturos al Marino.

-Ĉu vi demandis ŝin kial ŝi restos en Burgo?

-Mi demandis, sed Klara nenion diris.

-Ĉu poste vi telefonis al ŝi?

-Kiam mi revenis en Marinon, post unu horo, mi telefonis, sed ŝia telefono ne funkciis kaj mi tute ne komprenis kial. Poste denove mi telefonis, sed ne estis telefonsignalo. Mi ege maltrankviliĝis... Ĉu vi trovos ŝin?

Veronika alrigardis Safirov-on kaj en ŝiaj okuloj li vidis triston.

-Ja, ŝi estas mia la plej bona amikino kaj jam trian tagon neniu ion scias pri ŝi. En nia klaso ĉiuj demandas sin kio okazis al Klara, kial ŝi ne frekventas la lernejon?

-Ni faros ĉion por trovi ŝin – diris Safirov, - sed estos malfacile. Pasis tri tagoj. Ni ne multe scias pri ŝi. Nun de vi mi aŭdis pri Filip kaj tio certe helpas nin.

-Mi ĉiutage preĝas, ke vi baldaŭ trovu ŝin. Sen Klara mia vivo ne estos interesa. Ni kune lernis, kune amuziĝis. Ŝi estis tre gaja. Somere ni sunbaniĝis, naĝis en la maro, ludis sur la strando kaj nun mi estas sola. Tio teruras. Mi ne scias kien ŝi iris, kun kiu ŝi estas...

-Dankon, Veronika. Vi helpis min. Se mi havus aliajn demandojn, mi denove venos. Ĝis revido. Kaj mi petas vin, atentu, ne fidu nekonatajn personojn. Ne ĉiuj estas bonintencaj.

-Dankon. Mi estos singardema. Post la malapero de Klara, mi ege timas.

Safirov diris "ĝis revido" al la patrino de Veronika, dankis pro la kunhelpo kaj eliris el la domo.

En la aŭto survoje al Burgo, li meditis, ke post la konversacio kun Veronika, li jam scias ion gravan. Klara konis iun Filip, sed kiu estas tiu Filip? Kie li loĝas? Kiel li aspektas? Veronika diris, ke li estas impertinenta, ĵaluza, ĝenis Klara-n, atendis ŝin antaŭ la lernejo. Li pli aĝas ol Klara, estas gruisto kaj laboras ĉe la haveno. Tio sufiĉis por ke Safirov serĉu lin. Nun Safirov devis renkontiĝi kun Filip kaj ekscii ĉu Klara estis kun li en la tago, kiam ŝi malaperis. Veronika menciis alian nomon, Vlad, najbaro. Kiu li estas? Kelkfoje li veturigis la knabinojn per sia aŭto al la lernejo. Safirov devis same ekscii ion pri tiu Vlad.

La aŭto rapidis al Burgo. Kiel diris Veronika, pasis tri tagoj kaj neniu ion scias pri Klara. Ne venis informoj de la najbaraj urbaj policoj, nek de la kvartalaj policoj. Jam la okazintaĵo estas ege maltrankviliga. Ĉu Klara estas viva? Necesas rapida agado, ne estas tempo.

Safirov haltigis la aŭton antaŭ la policejo, eniris sian kabineton kaj tuj telefone ordonis, ke oni serĉu Filip-on, havena gruisto, kaj alvoku lin por pridemandado.

8.

La 18-an de aprilo

La suno aperis kaj lumigis la fenestron de la dormoĉambro. “Finfine mateniĝis, diris al si mem Darina. Ankoraŭ unu serena mateno, sed en mia animo malhelas kiel en tombo.” Tutan nokton ŝi ne dormis, kuŝis en la lito kun malfermitaj okuloj. Ŝajnis al ŝi, ke la pordo de la domo malfermiĝas kaj aŭdas molajn malkuraĝajn paŝojn. “Klara revenas” - flustris Darina kaj kelkfoje stariĝis de la lito por vidi ĉu vere la pordo malfermiĝis. En la tuta domo tamen regis silento kaj mallumo. Darina revenis, kuŝis denove kaj antaŭ ŝia rigardo aperis la vizaĝo de Klara. Jen ŝi, kun la longaj, molaj, blondaj haroj kaj la karaj cejankoloraj okuloj. “Klara, vi estas, mi vidas vin, mi tre bone vidas vin. Mi vidas eĉ la nevuson sur via dekstra ŝultro, similan al eta luno, deliras Darina.” En la dormo ŝi etendas brakojn por ĉirkaŭbrakumi Klara-n, sed subite vekigis kaj senvoĉe esploras. La densa mallumo en la ĉambro sufokas ŝin, Darina ne povas spiri kaj deziras forte ekkrii: “Aeron, aeron, lumon kaj aeron, mi sufokiĝas!”

Denove dolore ŝi streĉiĝas, ĉar denove ŝajnas al ŝi, ke la pordo malfermiĝas.

Finfine la unuaj sunradioj traboras la fenestrajn kurtenojn. Mateniĝis. La koŝmara nokto finiĝis. Darina ekstaris de la lito, ekiris al la banejo kaj sub la duŝo ŝi denove esploris. Ĉi tie, en la banejo, Dobri ne vidas, ke ŝi ploras. Darina ploras kaŝe de li, ĉar ne deziras maltrankviligi lin. Poste ŝi vestas sin kaj estas preta por foriri.

-Kien vi iras? – demandis Dobri.

-Hodiaŭ mi petis forpermeson – respondis Darina – kaj mi iros en Burgon demandi komisaron Safirov ĉu oni eksciis ion pri Klara.

-Darina kara, mi komprenas vin – diris Dobri, – tamen se de mateno ĝis vespero vi estos en Burgo, vi ne trovos ŝin.

Neniu scias kie estas Klara kaj kio okazis al ŝi. Se la polico ekscios ion, ili tuj telefonos al ni.

-Jes, sed mi ne povas esti senmova ĉi tie kaj atendi. Mi freneziĝas, ĉu vi ne komprenas min? – kaj Darina denove ekploris.

-Kara, mi komprenas vin. Ankaŭ mi freneziĝas, sed ni estas senpovaj. Kion ni faru? Kien ni iru? Nenion ni scias kaj ne trovas klarigon de tio, kio okazis.

-Mi tamen iros en Burgon! Mi decidis! Ĝis reveno – kaj Darina iris el la domo.

Estis frue matene, kiam Darina alvenis en Burgo, descendis de la aŭtobuso kaj ekiris sur straton “Nigra Maro”. Post ŝi kaj kontraŭ ŝi paŝis multaj homoj. Iuj el ili rapidis al la laborejoj, aliaj – al lernejoj kaj universitatoj. Darina febre rigardis la junulinojn kaj ŝajnis al ŝi, ke en la tumulto subite vidos Klara-n. Antaŭ si Darina rimarkis knabinon kun blondaj haroj kaj ruĝa jako. Ŝia koro komencis bati kiel galopanta ĉevalo. Darina rapidigis paŝojn, atingis la knabinon, kaptis ŝiajn ŝultrojn kaj laŭte diris:

-Klara!

La knabino turnis sin kaj per larĝe malfermitaj okuloj alrigardis Darina-n. Tiam Darina vidis, ke la knabino ne estas Klara.

-Pardonu min, pardonu min – ekbalbutis ŝi.

La knabino nur ekridetis, eble opiniis, ke Darina ne bone fartas.

Darina rapide daŭrigis sur la straton kaj baldaŭ estis antaŭ la gimnazio, kie lernis Klara, granda kvaretaĝa konstruaĵo kun multaj fenestroj, en kies vasta korto estis korbopilka kaj retpilka ludejoj. La gelernantoj venis unu post la alia aŭ grupe. Post dudek minutoj komenciĝos la unua lernohoro. Darina staris ĉe kaŝtanarbo, antaŭ la lerneja korto kaj rigardis ilin. Ŝi esperis, ke inter ili estos Klara kaj nepre vidos ŝin, kiam eniros la lernejon.

Al la lerneja korto rapidis juna viro, dudekkvarjara kun krispa nigra hararo kaj okuloj kiel verdaj olivoj. Li surhavis helbluan kostumon, blankan ĉemizon, ĉerizkoloran kravaton. Darina tuj rekonis lin. Estis Krasen Drakov, la klasestro de Klara, instruisto pri literaturo. Darina alpaŝis al li.

-Bonan matenon, sinjoro Drakov – salutis lin Darina.

La viro alrigardis ŝin kaj provis rememori kiu ŝi estas.

-Mi estas la patrino de Klara – diris Darina.

-Jes.

-Klara malaperis. Ĉu iu el ŝiaj samklasanoj scias ion pri ŝi?

-Neniu ion scias – diris la instruisto, – sed pardonu min.

Mi rapidas, mi havas lecionon kaj devas nepre eniri la klasĉambbron antaŭ la gelernantoj – kaj Drakov preskaŭ ekkuris al la lerneja pordo.

Darina restis senmova, rigardanta post li. Nur antaŭ du monatoj ŝi estis en la lernejo por kontroli la studobjektajn pritaksojn de Klara kaj tiam Drakov diris, ke Klara estas perfekta lernantino, verkas tre belajn eseojn kaj li tre kontentas pri ŝi. Kaj nun Drakov preskaŭ ne rekonis Darina-n. Li rapidis kaj verŝajne tute ne atendis vidi ŝin.

Darina restis ankoraŭ iomete antaŭ la lerneja korto. La gelernantoj eniris la klasĉambrojn, eksonis la lerneja sonorilo, kiu anoncis la komencon de la unua lernohoro. La okuloj de Darina denove eklarmis. Ĉiuj gelernantoj jam estis en la lernejo, nur Klara – ne. Kie ŝi estas? Kio nun okazas al ŝi? Kiel tiel subite ŝi malaperis? Al tiuj ĉi demandoj ne estis respondo. Ĉu iam Darina denove vidos Klara-n aŭ neniam ekscios kio okazis al ŝi?

Malrapide Darina ekiris al la ĉefa policejo. La strato “Pirin” pasis preter la parko ĉe la maro kaj denove peza tristo obsedis ŝin. Kiam Klara estis sesjara, Darina ofte venis kun ŝi en tiun ĉi parkon. Klara tre ŝatis luli sin sur la luliloj. Kiel feliĉa ŝi estis tiam. Darina rememoris malnovan proverbon: “Malgrandaj infanoj – malgrandaj zorgoj.” Jes, kiam Klara

estis infano, ŝi estis ĝojo por ĉiuj kaj nun ŝi kaŭzis triston kaj doloron. Malfacila estas la patrina sorto, meditis Darina. La patrinoj naskas infanojn, zorgas pri ili, edukas ilin, iom post iom la infanoj kreskas, iĝas plenaĝaj, memstaraj, forlasas la gepatran neston, sed por la patrinoj ili ĉiam restas infanoj kaj la patrina emo zorgi pri ili neniam malaperas.

Darina eniris la ĉefpolicejon kaj petis la deĵorantan policanon telefoni al komisaro Safirov kaj diri, ke Darina Veselinova venis al li. La policano telefonis.

-Sinjorino, komisaro Safirov atendas vin – li turnis sin al Darina.

Ŝi ekiris al la kabineto de Safirov.

-Bonan matenon, sinjoro komisaro – salutis ŝi enirante en la ĉambron.

-Bonan matenon, sinjorino Veselinova – diris Safirov kaj ekstaris.

-Mi petas pardonon pro la ĝeno, sed mi venis demandi ĉu estas espero? – diris mallaŭte per tremanta voĉo Darina.

-Ni jam havas la unuan spuron – respondis Safirov. – Nun mi ne deziras mencii detalojn, sed mi esperas, ke baldaŭ ni scios ion pli konkretan pri la malapero de Klara.

-Dankon, sinjoro komisaro.

-Mi nur deziras peti vin havi pli da pacienco. Vi komprenas, ke ne estas facile trovi knabinon, kiu subite malaperis. Jam kvar tagojn mi meditas. La kialoj kaj la supozoj estas sennombraj. Tamen finfine ni trovos Klara-n. Tre malofte estas la okazoj, kiam homoj malaperis kaj ni ne trovis ilin.

-Dankon. Tage kaj nokte mi atendas ŝin. Mi jam tute elĉerpiĝis. Mi ploras, ne dormas, ne povas labori...

-Mi komprenas vin. Ni nepre trovos ŝin. Tamen nun mi ne povas trankviligi vin. Mi nur diros: havu paciencon kaj estu forta por travivi tiujn ĉi turmentajn tagojn.

-Ankoraŭfoje pardonu min – diris Darina. – Ĝis revido.

Ŝi eliris el la kabineto.

Dum tiuj ĉi kelkaj tagoj Darina tute ŝanĝiĝis. Ŝia vizaĝo iĝis grizkolora, la brilo de ŝiaj okuloj malaperis kaj ombro vualis ilin. Darina kvazaŭ maljuniĝis de dek jaroj. Safirov tamen devis daŭrigi la serĉadon. Li jam havis precizan planon, kiun strikte realigos.

9.

La domo de Filip troviĝis en kvartalo de la fiŝkaptistoj, en la rando de Burgo. Antaŭ jaroj ĉi tie estis nur fiŝkaptistaj kabanoj, faritaj proksime al la mara bordo kaj antaŭ ĉiu kabano kuŝis boato. Iom post iom la fiŝkaptistoj komencis konstrui domojn kaj tiel aperis la fiŝkaptista kvartalo. Ĝi troviĝis malproksime de la urbo, sed kiel en ĉiuj kvartaloj, same ĉi tie estis lernejo, vendejoj, polikliniko, kvartala policejo...

Filip loĝis kun sia patrino en domo, kiu konsistis el du ĉambroj kaj kuirejo. Antaŭ la domo estis malvasta korto, kie onklino Nedelja, la patrino de Filip, kultivis iom da tomatoj kaj kukumoj. La patro de Filip, fiŝkaptisto, forpasis subite, kiam Filip estis lernanto en la baza lernejo.

Onklino Nedelja estis kudristino, sed en la kvartalo loĝis malriĉuloj kaj ŝi ne ĉiam havis laboron. Kutime ŝi ne kudris vestojn, sed riparis malnovajn jupojn, pantalonojn, jakojn, mallongigis pantalonojn aŭ iomete modifis virinajn robojn. Se iu knabino devis vesti kaj esti kun la robo de sia pli aĝa fratino, onklino Nedelja modifis ĝin, por ke estu konvena al la pli juna fratino.

Filip finis la bazan lernejon, ne daŭrigis lerni en la gimnazio kaj komencis labori kiel gruisto ĉe la haveno de Burgo. Onklino Nedelja ĝojis, ke Filip laboras, ĉar lia salajro estis tre necesa al ili.

Filip ne havis amikojn. Jam kiel infano li preferis esti sola kaj evitis la bruajn petolajn infanajn grupojn. Kiam li komencis labori, lia plej ŝatata amuziĝo estis la dancklubejoj. Li konis preskaŭ ĉiujn dankklubejojn en Burgo, kie li pasigis

horojn, aŭskultis la muzikon kaj rigardis la dancantajn gejunulojn. Filip ŝatis trinki kaj fojfoje okazis, ke iom pli multe li trinkis kaj ebriiĝis. Tiam li faris skandalojn. La gardistoj en la dancklubejoj bone konis lin kaj kiam ili vidis, ke Filip estas iom ebria, delikate petis lin eliri el la dancklubejo.

Iun vesperon, antaŭ jaro, Filip estis en la dancklubejo “Nimfo”. Kiel ĉiam li sidis ĉe tablo en la angulo kaj rigardis la dancantajn gejunulojn. Sur la dancejo dancis kelkaj geknaboj. Unu el la knabinoj tie, verŝajne gimnazianino, estis tre bela, blondhara kun harmonia korpo, vestita en blua moda pantalono kun neĝblanka bluzo. Dum la dancado iu el la knaboj, eble iom ebria, komencis ĝeni ŝin. La knabo deziris danci kun la blondulino, sed ŝi rifuzis. Tiam la knabo koleriĝis, tiris la brakon de la knabino kaj ion kriis al ŝi.

Kiam Filip vidis tion, li tuj saltis, iris al la dancejo kaj severe avertis la knabon ne ĝeni la knabinon.

-Kiu vi estas? – demandis la knabo. – Tio ne estas via zorgo! – alrigardis kolere lin la knabo.

-Tuj mi diros al vi kiu mi estas kaj kia estas mia zorgo – diris Filip kaj forte puŝis la knabon. – Mi ripetos: ne ĝenu la knabinojn, ĉar vi bedaŭros!

La knabo diris ion ofendan, Filip pli forte puŝis lin kaj la knabo falis.

Tiam la bela blondulino dankis al Filip.

Tiel Filip konatiĝis kun Klara kaj Veronika. Post tiu ĉi vespero li komencis pli ofte viziti “Nimfon” kaj renkontiĝi kun Klara kaj Veronika tie. Filip enamiĝis en Klara-n kaj komencis ofte atendi ŝin antaŭ la lernejo.

Hodiaŭ Filip revenis de la laborejo, rapidis lavi kaj vesti sin por iri en la dancklubejon “Nimfo”. Li estis en la banejo, kiam onklino Nedelja vokis lin.

-Filip, venu. Todor Rjahov, la kvartala policano, serĉas vin.

-Kial? – demandis Filip el la banejo.

-Venu, venu. Li diros al vi.

Filip eliris el la banejo nuda ĝis la lumbo kaj iris al la pordo, kie atendis lin la kvartala policano, Rjahov, dika, ruĝvanga kun timigaj lipharoj.

-Jen. Mi estas ĉi tie. Kio okazis? – demandis Filip. – Kial vi serĉas min?

-Morgaŭ matene je la naŭa horo estu en la ĉefurba policejo. Komisararo Safirov deziras paroli kun vi.

-Diable. Nenion mi faris. Kial tiu ĉi komisararo deziras paroli kun mi? Neniun mi batis.

-Iru tien! Oni diros al vi – kaj la kvartala policano iom ruzete ekridetis.

-Nenien mi iros! – koleriĝis Filip.

-Se vi ne iros, vi havos problemojn. Mia tasko estis diri al vi kaj vi mem decidu ĉu iri aŭ ne iri.

La policano foriris kaj Filip eniris hejmen.

-Kio okazis? – demandis lin onklino Nedelja maltrankvile. – Ĉu vi denove faris iun stultaĵon, ĉu vi batis iun?

-Nenion mi scias! – respondis Filip sendezire. – Neniun mi batis!

-Filip, Filip – veis onklino Nedelja. – Vi kaŭzas nur problemojn.

Onklino Nedelja estis malalta, maldika virino, ĉirkaŭ kvindekjara kun milda vizaĝo kaj kvietaj brunkoloraj okuloj. Ŝi ne estis el Burgo, naskiĝis en la proksima vilaĝo Serda kaj kiam ŝi estis dekokjara venis al Burgo por labori. Tiam ŝi komencis labori en fabriko por vestoj, sed kiam edziniĝis kaj naskiĝis Filip, forlasis la laboron en la fabriko kaj komencis zorgi pri Filip. Onklino Nedelja finis nur bazan lernejon en sia naska vilaĝo, sed estis nature inteligenta, lernema kaj ŝatis legi. La plej granda ŝia revo estis, ke Filip edziĝu, havu infanojn kaj onklino Nedelja zorgu pri la nepoj. Ŝi ofte diris al Filip:

-Filip, vi jam devas edziĝi, havi familion. Forlasu la dancklubejojn, konatiĝu kun bona, modesta junulino, edziĝu,

havu infanojn. La vivo rapide pasas. Vi maljuniĝos kaj poste ne estos facile zorgi pri infanoj.

Filip tute ne deziris aŭdi ŝin. De kiam li konatiĝis kun Klara, li pensis nur pri ŝi. Klara obsedis lian konscion. Tage kaj nokte li kvazaŭ vidis ŝin antaŭ si. Ofte nokte Filip songis pri ŝi. En la songoj li vidis sin ŝia edzo, ke ili estas familio, havas infanojn.

Klara estis lernantino, nun en la dekunua klaso, sed Filip firme decidis, ke kiam ŝi finos gimnazion, li tuj edzinigos ŝin. “Ŝi estos nur mia kaj al neniu alia! – diris Filip.”

10.

La 19-an de aprilo

Ĝuste je la naŭa horo matene Filip eniris la urban ĉefpolicejon kaj oni enkondukis lin en la kabineton de komisararo Safirov.

Safirov alrigardis lin. Verŝajne dudekunujara, Filip estis alta, forta, nigrahara, vestita en ĝinzo kaj sporta jaketo.

-Sidiĝu! – ordonis Safirov.

Filip sidiĝis antaŭ la skribotablo de Safirov.

-Ĉu vi scias kial vi estas ĉi tie? – demandis Safirov.

Filip alrigardis lin iom malkontente kaj nur diris:

-Ne.

-Bone. Mi klarigos al vi. De kiam vi konas Klara-n Veselinova-n?

-De unu jaro.

-Kie kaj kiel vi konatiĝis kun ŝi.

-En dancklubejo “Nimfo” – respondis li.

-Ĉu vi ĝenis Klara-n?

-Neniun mi ĝenis! – diris kolere Filip.

-Oni ofte vidis vin atendi Klara-n antaŭ la lernejo.

-Mi eĉ ne scias kie ŝi lernas – respondis Filip.

-Vi diris, ke Klara estos nur via kaj al neniu alia, ĉu ne?

-Tio estas fia mensogo! – protestis Filip – Ĉu de ŝi vi aŭdis tion?

-Kie nun estas Klara?

-Mi ne scias. Mi ne estas ŝia vartistino – ekridaĉis Filip.

-Pripensu bone! – kaj Safirov fiksrigardis lin.

-Mi diris. Mi ne scias! – obstinis Filip.

-Kiam lastfoje vi vidis ŝin?

-Mi ne memoras.

-Provu rememori!

-Eble antaŭ semajno – diris Filip.

-Kie?

-En dancklubejo “Nimfo”.

-Ĉu la 15-an de aprilo vi ne vidis ŝin?

-Mi ne memoras kion mi manĝis la 15-an de aprilo kaj vi demandas pri iu Klara?

Safirov alrigardis lin severe:

-Vi devas tuj rememori!

-Kio okazos, se mi ne rememoros? – demandis Filip impertinente.

-Mi arestos vin!

-Vi ne rajtas. Mi estas libera homo!

-Vi malhelpas la policesploron!

-Bone. Mi diris. Mi vidis ŝin antaŭ semajno en “Nimfo”.

-Mi ne havas aliajn demandojn, – diris Safirov, – sed mi avertas vin. Ne forlasu la urbon, ne vojaĝu! – kaj li severe alrigardis Filip-on.

-Bone – murmuris Filip kaj eliris el la kabineto.

Kiam Filip eliris, Safirov telefonis al serĝento Rumen Kolev.

-Kolev, venu al mi.

Post kelkaj minutoj Rumen Kolev eniris la kabineton de Safirov.

-Kolev, mi pridemandis Filip-on Markov-on, rilate la malaperon de Klara Veselinova. Li bone konis ŝin, ĝenis ŝin kaj li estas suspektinda. Vi devas observi lin. Vidu kien li iras kun kiu li renkontiĝas. Ni havu pli da informoj pri li. Antaŭ du jaroj kelkfoje Filip Markov estis arestita, li kutimas drinki, ebriiĝis, faris skandalojn en la dancklubejoj.

-Bone. Mi observos lin kaj mi raportos – diris Kolev.

-Jam de hodiaŭ komencu la observadon.

-Jes – diris Rumen Kolev kaj eliris el la kabineto de Safirov.

Post la eliro de serĝento Kolev, Safirov demandis sin: “Ĉu Filip scias ion pri la malapero de Klara?” Safirov havis du ĉefajn supozojn: aŭ Klara mem forkuris de la domo, kaŝis sin ie kaj Filip scias kie ŝi estas, aŭ Filip perforte forkaptis Klara-n, fermis kaj ŝlosis ŝin ie. La dua supozo estis pli verŝajna, ĉar Filip plurfoje diris, ke Klara estos nur lia kaj al neniu alia. Tion Filip diris en la dancklubejo kaj same Veronika menciis tiujn liajn vortojn.

11.

Por la spionado de Filip, Rumen Kolev bone preparis sin. Li trarigardis la foton de Filip, kiu troviĝis en la arkivo de la polico. Antaŭ jaroj, post kelkaj skandaloj en dancklubejoj, Filip estis arestita kaj en la polico estis lia foto.

Je la kvina horo posttagmeze Kolev, vestita ne en polica uniformo, sed en ordinaraj vestoj, estis proksime ĉe la granda havena pordo. Li staris sur la trotuaro ĉe la bushaltejo kaj ŝajnis sin, ke atendas la buson al la kvartalo de la fiŝkaptistoj.

Je la kvina horo kaj dek minutoj de la haveno komencis veni la laboristoj: dokistoj, levmaŝinistoj, motorvagonistoj... Kolev tuj rimarkis Filip-on. Li iris kun tri viroj, kiuj vigle babilis. Kolev supozis, ke Filip venos al la bushaltejo kaj same atendas la buson al la kvartalo de la fiŝkaptistoj, sed Filip kun la viroj ekiris al la centro de la urbo. Kolev tuj sekvis ilin.

La kompanio de Filip trapasis la grandan placon antaŭ la ĉefa stacidomo, ekiris sur la straton “Blanka Rivero” kaj eniris la drinkejon “Je via sano”. Kolev atendis kelkajn minutojn proksime al la drinkejo kaj poste same eniris ĝin. Filip kaj liaj kolegoj sidis ĉirkaŭ tablo kaj mendis bieron. Kolev sidiĝis ĉe flanko tablo por pli bone observi ilin kaj ankaŭ mendis bieron. La kompanio de Filip vigle konversaciis, ridis kaj denove mendis bieron.

Post horo Filip kaj liaj kolegoj forlasis la drinkejon. Sur la strato ili disiĝis kaj ekiris al diversaj direktoj. Kolev sekvis Filip-on, kiu iris al la proksima bushaltejo por atendi la aŭtobuson. Kiam venis la aŭtobuso, Filip kaj Kolev eniris ĝin. En la kvartalo de la fiŝkaptistoj ili eliris. Filip ekiris hejmen kaj Kolev eniris kafejon, proksime al la domo de Filip kaj atendis por vidi ĉu Filip eliros el la domo. Post horo Kolev eliris el la kafejo kaj foriris.

La sekvan matenon Kolev denove estis antaŭ la haveno. Je la oka horo oni komencis la laboron, sed Filip ne venis. Kolev tuj iris al la ĉefo de Filip kaj prezentis sin.

-Mi estas serĝento Rumen Kolev – diris li kaj montris sian legitimilon al korpulenta, liphara viro, kies vizaĝo estis kvazaŭ ĉizita el granita ŝtono. – Ĉu vi scias kial hodiaŭ Filip Markov ne venis?

-Ne – respondis la viro. – Hieraŭ li laboris, sed hodiaŭ ne venis. Kio estas la kialo, mi ne scias. Li ne telefonis kaj ne avertis min. Hodiaŭ lia grupo ne laboros kaj tio estos granda perdo.

Kolev eliris el la haveno, atendis ankoraŭ duonhoron, sed Filip ne venis kaj Kolev telefonis al Safirov, ke Filip subite malaperis.

Safirov tuj kunvokis la polican grupon por rapida reago. Grupestro estis Bojan Danev, juna sperta policano, kaj Safirov ordonis al li:

-Via tasko estas iri en la kvartalon de la fiŝkaptistoj, en la domon de Filip Markov kaj se li estas tie, aresti lin. Li estas suspektita pri la malapero de Klara Veselinova. Se vi ne trovos lin en la domo, vi havos skriban ordonon priserĉi la loĝejon por krimindicoj pri la malapero de Klara Veselinova.

La grupo de Bojan Danev tuj ekveturis al la kvartalo de la fiŝkaptistoj. En la domo tamen ili trovis nur la patrinon de Filip, onklinon Nedelja-n. Ŝi serioze ektimis, kiam vidis la policianojn kaj en la unua momento ŝi ne povis eĉ sonon prononci.

-Kie estas via filo? – demandis Bojan Danev.

-Li iris labori. Li laboras ĉe la haveno – diris la patrino.

-Hodiaŭ li ne estas tie kaj mi konsilas vin sincere diri kie li estas? – demandis Danev.

Onklino Nedelja komprenis, ke estos malbone, se ŝi ne diros la veron.

-Filip ektimis, ke vi akuzos lin pro la riĉulino, la lernantino, kiu malaperis kaj li forkuris, li diris, ke kaŝos sin, sed kie mi ne scias.

-Mi avertas vin! Diru kie li estas, – severe alrigardis ŝin Danev – ĉar se vi kaŝas lin, vi estas lia kunaganto kaj vin oni same kondamnos.

La policianoj detale traserĉis la loĝejon, sed ne trovis krimindicojn.

-Se Filip revenos, – diris Bojan al la patrino – vi devas tuj informi nin!

-Jes – promesis ŝi forte timigita.

La polica grupo foriris.

En la policejo Safirov ordonis la serĉadon de Filip Markov en la tuta regiono.

12.

La nokto kovris la arbaron kaj kvazaŭ pli profunda estiĝis la silento. Inter la branĉoj videblis la ĉielo kaj tie supre

kiel flametoj tremis la sennombraj steloj. La luno, simila al eta barko, malrapide naĝis. Febla vento blovis de la maro.

Tutan tagon Filip kaŝis sin en la arbaro kaj nun, kiam vesperiĝis, li ekstaris de la falanta arbo sur kiu li sidis, kaj ekiris al la ŝoseo. Jam pli malofte pasis aŭtoj. Nur de tempo al tempo kiel longaj fortaj radioj lumigis la asfaltan vojjon la lumĵetiloj de iu aŭto aŭ aŭtobuso. Filip ekstaris ĉe la rando de la ŝoseo, rigardis dekstren kaj maldekstren kaj poste rapide trapasis ĝin.

Je la alia flanko de la ŝoseo estis la mara bordo kaj tie, sub kelkaj akacioj, videblis la ligna kabano de oĉjo Teofil. Sur la bordo jam ne estis homoj, sed Filip ŝtelire proksimiĝis al la kabano.

Fiŝkaptisto, iama amiko de la patro de Filip, oĉjo Teofil pasigis la somerojn ĉi tie. Antaŭ la kabano kuŝis lia malnova boato kaj ĉe ĝi, sur palisoj, sekiĝis la granda fiŝkaptista reto.

Filip paŝis tre atente en la mallumo. Nur la kvieta plaŭdo de la ondoj rompis la noktan silenton. Li ekstaris antaŭ la pordo kaj ekfrapetis. Ene aŭdiĝis basa vira voĉo:

-Kiu estas?

-Mi, Filip el Burgo.

-Eniru, filo, – diris la viro kaj malfermis larĝe la pordon.

Filip eniris la duonluman kabanon. Ĉi tie ne estis elektro kaj oĉjo Teofil uzis petrolan lampon.

-Kio okazis? – demandis la maljunulo. – Ĉu via patrino ne bone fartas?

Filip ne respondis.

-Sidiĝu – diris Teofil.

Filip proksimiĝis al la malnova ligna tablo kaj sidiĝis sur unu el la seĝoj. Plurfoje li venis ĉi tien, sed nun denove li ĉirkaŭrigardis. En la kabano estis tablo, du seĝoj, du lignaj litoj, ŝranko, gasforno. Nur somere oĉjo Teofil loĝis ĉi tie. Ĉiutage frumatene li vekiĝis, fiŝkaptadis, poste vendis la fiŝojn al la ripozantoj en la najbaraj ripozejoj kaj dumtage li aŭ

babilis kun aliaj fiŝkaptistoj, aŭ per la boato li promenadigis la ripozantojn al la proksima insulo Sankta Klemento.

“Ĉi tie mi plej bone fartas” – kutimis diri oĉjo Teofil. – “Ĉi tie mi vere vivas. Vintre, kiam mi estas en la urbo, mi sufokiĝas kaj mi ne certas, ĉu mi estos viva ĝis la somero, por ke mi denove venu ĉi tien.”

Nun oĉjo Teofil metis glaseton sur la tablon, verŝis en ĝin brandon kaj diris al Filip:

-Bonan venon, je via sano kaj rakontu kio okazis.

Filip iom hezitis, sed oĉjo Teofil alrigardis lin per siaj grandaj kiel prunoj okuloj kaj en lia iom raŭka voĉo eksonis patra zorgemo.

-Diru. Verŝajne denove vi malbone agis?

Malrapide Filip ekparolis. Li rakontis pri Klara, pri la komisaro, kiu lin pridemandis.

-Klare – diris la maljunulo. – Vi forkuris por kaŝi vin.

-La policanoj supozas, ke mi ion malbonan faris al la knabino... - diris Filip – kaj eble arestos min.

-Jes. Ili jam plurfoje renkontiĝis kun vi antaŭe kaj ili supozas, ke vi kulpas pri ŝia malapero. Tamen vi ne devis forkuri. Tiel nun vi estas pli suspektinda. Vere, kiam vi trinkas, vi estas iom flamiĝema.

-Mi ŝin amas – diris Filip.

-Mi scias kio estas la amo. Mi same iam estis juna. Kiam mi ekamis vian onklinon, Dina, mia edzino, mi pretis bati ĉiun, kiu ŝin alrigardis. La juneco estas flamo. Je via sano – kaj oĉjo Teofil levis sian glaseton kaj iom trinkis de la brando. – Mi por Dina pretis tranaĝi la maron.

Li eksilentis, iom rigardis la botelon da brando, kiu estis antaŭ li sur la tablo, kaj daŭrigis:

-Kiam mi unuan fojon vidis Dina-n sur la strato, mi diris, kiel vi – ŝi estos nur mia! Plurfoje mi kaŝis min ĉe ŝia domo por vidi ŝin. Ŝi sciis, ke mi estas tie kaj ĵetis al mi el la fenestro notetojn. Mi decidis kaj prenis Dina-n de la domo!

Oĉjo Teofil denove eksilentis, kvazaŭ deziris rememori kio ĝuste okazis antaŭ tiom da jaroj aŭ eble li emociiĝis pro la iamaj rememoroj. Iom li gratis sian densan barbon kaj denove ekparolis:

-Kiam Dina ekloĝis kun mi, ŝi venis nur kun unu sola robo. Nenion ŝi sukcesis preni el sia patra domo. Ŝiaj gepatroj ne estis kontentaj, ke ni ekloĝis kune, tamen ni geedziĝis kaj post jaro naskiĝis nia unua filo, Danko. Jes. Tio estas la vera amo.

La maljunulo alrigardis Filip kaj serioze diris:

-Ĉi-nokte vi restu ĉi tie, morgaŭ frumatene revenu en Burgon! Ja, vi ne kulpas. Vi ne devas forlasi vian laboron ĉe la haveno. La policianoj komprenos, ke vi ne kulpas. Tamen trovu junulinon, konvenan por vi kaj ne kuru post knabinoj, kiuj ankoraŭ ne estas plenkreskaj kaj ne scias kion ili deziras – kaj la maljuna fiŝkaptisto denove levis la glaseton kaj trinkis.

-Ne. Mi ne revenos en la urbon! – diris firme Filip. – Oĉjo Teofil, vi tre bone scias, ke por la polico estas grave kulpigi iun. Oni decidis kulpigi min. Ili ne kredas, ke mi amis ŝin kaj neniam mi deziris ion malbonan fari al ŝi.

-Jes, sed vi ne povas kaŝi vin. Finfine la polico trovos vin kaj poste por vi estos pli malbone. Post via forkuro ili jam certas, ke vi estas kulpa. Diru al mi sincere, ĉu vi scias ion pri la malapero de la knabino?

Filip silentis, nenion li respondis, nur senmove rigardis la etan glaseton da brando sur la tablo.

-Bone. Vi mem pripensu kion vi faros – diris la maljunulo.

Tutan nokton Filip ne ekdormis. La ligna lito ne estis oportuna. Li turnis sin dekstren kaj maldekstren. Ekstere la ondoj ritme plaŭdis. Sennombraj pensoj kaj meditoj turmentis Filip-on. Kio okazos? Se li revenus en la urbon, la policianoj tuj arestus lin kaj komencus denove pridemandi lin. Ili nepre dezirus ekscii kie estas Klara. La policianoj certe kredas, ke

Filip kulpas kaj li kaŝas ie Klara-n. Ne! Li ne deziris denove esti en la policejo. Prefere li vagos, kaŝos sin, sed ne revenos en la urbon!

13.

La 21-an de aprilo

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-matene, Vlad iris promenadi sur la mara bordo. Li eliris el la domo kaj profunde enspiris la freŝan aeron. Estis belega serena aprila mateno. Malrapide Vlad trapasis la centron de Marino kaj post kelkaj minutoj jam estis sur la strando. Neniu videblis ĉi tie. La maraj ondoj kviete plaŭdis. La senlima maro ravis lin. Eble horon li promenadis sur la strando. Ĉi tie, ĉe la maro, li sentis sin libera, senzorga, vigla. La friska mara vento forblovis ĉiujn liajn malbonajn, malagrablajn pensojn. Post ĉiu promonado Vlad pli bone laboris kaj estis dankema al la aprilaj matenoj, kiuj donis al li fortojn.

Komisaro Safirov haltigis la aŭton antaŭ la domo, en kiu loĝis Vlad Ezokov, eliris el ĝi kaj ekiris al la korta pordo, tamen ĝi estis ŝlosita. Safirov ĉirkaŭrigardis. El la najbara korto eliris virino, sesdekkvinjara, iom pli dika, kun okulvitroj, vestita en brunkolora hejma robo kaj tuj ŝi diris al Safirov:

-La najbaro ne estas hejme. Matene li promenas ĉe la maro, sed baldaŭ revenos.

-Dankon – diris Safirov. – Mi atendas lin.

-Ĉu vi estas policano? – scivolis la virino.

-Jes – diris Safirov.

-Kion li faris? – demandis la virino. – Mi estas Nada Ivanova, najbarino, mi konas lin. Tre suspektinda li estas.

-Mi nur deziras paroli kun li – diris Safirov, kiu tuj komprenis, ke la virino estas unu el la klaĉulinoj, kiuj estas en ĉiuj kvartaloj.

Kiam Vlad proksimiĝis al la domo, li vidis antaŭ la pordo de la korto polican aŭton, sed ne demandis sin kial la aŭto staras ĝuste antaŭ lia domo. Tamen kiam li komencis malŝlosi la pordon, el la aŭto eliris viro, ne tre alta, helharara, eble kvardekkvinjara kaj demandis lin:

-Ĉu vi estas Vlad Ezokov?

-Jes – respondis Vlad.

-Mi estas komisaro Kalojan Safirov kaj mi ŝatus konversacii kun vi.

-Pri kio temas? - demandis Vlad konsternita.

-Pli bone ni eniru la domon kaj mi diros.

-Bonvolu – kaj Vlad invitis la komisaron enen.

Ili eniris la ĉambron, la komisaro sidiĝis en unu el la foteloj kaj Vlad en alian. Iom maltrankvile Vlad atendis la demandojn de la komisaro, sed Safirov ne rapidis. Unue li bone trarigardis la ĉambron, kvazaŭ deziris vidi en ĝi ion neordinaran, poste turnis sin al la librobretaro kaj trarigardis la librojn sur ĝi.

-Vi loĝas ĉi tie jam de monato kaj duono, ĉu ne? – demandis Safirov.

-Jes – respondis Vlad.

-Kie vi loĝis antaŭe?

-En la ĉefurbo.

Post tiuj ĉi du demandoj Vlad komprenis, ke la komisaro anticipe bone informiĝis pri li kaj lia vivo, sed nun deziras ĉion aŭdi de li mem. Tamen Vlad ne povis diveni kio estas la kialo de la subita polica vizito.

-Kio estis via ĉefa okupo en la ĉefurbo? – demandis Safirov kaj denove ĵetis rigardon al la librobreto, kvazaŭ li deziris vidi tie serĉatan libron.

-Mi estis ĵurnalisto.

-Ĉu en tagĵurnalo?

-Ne. En la politika revuo “Mondo kaj Politiko” – respondis Vlad.

-Kaj kial vi forlasis la ĵurnalistan karieron, la ĉefurbon kaj venis loĝi ĉi tien?

-Mi divorcis – diris Vlad.

-Sed kial vi venis ĉi tien?

-Mi deziris loĝi en trankvila urbo, malproksime de la bruoj kaj vanteco – klarigis li.

-Tamen kiamaniere vi vivos ĉi tie? Se mi bone scias, vi ne laboras – ekinteresiĝis Safirov kaj tre atente alrigardis lin.

Vlad iom ekridetis, jes, la komisaro bone scias ĉion, sed ne ĉesas demandi.

-Nun mi ankoraŭ ne laboras. Antaŭ mia alveno mi vendis la malnovan gepatran domon en la ĉefurbo kaj mi havas iom da mono. Poste mi serĉos laboron en Burgo. Mi venis kaj dediĉis min al verkado.

-Ĉu?

Evidente por la komisaro tio estis tute nova informo kaj li ne provis kaŝi sian miron.

-Kion vi verkas? – demandis Safirov.

-Romanon. Ĉi tie neniu min konas kaj mi povas verki en soleco kaj trankvilo.

-Tre bone – iom ridetis Safirov.

-Mi ĉiam deziris esti verkisto – diris serioze Vlad, - sed dum mi estis ĵurnalisto, mi ne havis tempon. Finfine mi decidis forlasi ĉion kaj dediĉi min al la verkado.

-Jes – diris Safirov. – Mi devas konfesi, ke mi jam legis viajn rakontojn kaj ili plaĉis al mi. Via nomo estas neordinara kaj mi memoras viajn rakontojn, kiuj antaŭ jaroj aperadis en diversaj revuoj kaj ĵurnaloj.

-Ne estis malfacile kompreni, ke vi havas sufiĉe da informoj pri mi kaj mia ĝisnuna vivo, sed ĉu vi venis nur por konatiĝi kun mi? – demandis Vlad kaj fiksrigardis Safirov-on.

-Mi venis por demandi vin.

-Kion?

-Kelkfoje oni vidis vin veturigi per via aŭto al Burgo la knabinojn Klara Veselinova kaj Veronika Kambova.

-Jes. Ĉu tio estas krimo? – demandis Vlad. – Mi ne kaŝas, ke foje matene, kiam mi ekiris aŭte al Burgo pluvis. Klara kaj Veronika iris al la lernejo kaj mi proponis al ili veturigi...

-Poste kelkfoje denove okazis tio same – interrompis lin Safirov.

-Jes, okazis – konfesis Vlad. – Kiam Klara eksciis, ke mi estas verkisto, ŝi diris, ke verkas poemojn kaj deziris montri ilin al mi. Mi legis ilin kaj mi diris mian opinion pri ili.

-Ĉu hazarde vi ne havas ian klarigon kial Klara malaperis?

-Ne. Nenion mi scias – diris Vlad.

-Vi estas unu el la personoj, kiuj konis Klara-n kaj vi bone komprenas, ke vi estas unu el suspektitoj.

-Tiel oni konkludas – diris Vlad, – sed vi devas pruvi vian suspekton.

-Ja, tio estas mia laboro kaj tial mi estas nun ĉe vi. Nia hodiaŭa konversacio finiĝis, sed mi petas vin resti je nia dispono, ĉar eventuale ni denove renkontiĝos kaj denove konversacios pri Klara – avertis lin Safirov.

-Mi ne planas forveturi. Marino tre plaĉas al mi.

-Ĝis revido, sinjoro Ezokov. Mi deziras al vi sukcesan verkadon kaj mi esperas, ke mi estos inter la unuaj legantoj de via nova romano.

Kiam Safirov eliris el la domo de Vlad, li denove vidis la virinon, najbarinon, kiu staris en la korto de sia domo, sed nun ĉe ŝi estis alia virino kaj ili verŝajne atendis vidi, kiam Safirov eliros el la domo. La virino alrigardis lin kaj diris:

-Ĝis revido.

-Ĝis revido – diris Safirov, eniris la aŭton kaj forveturis.

La virinoj rigardis post la aŭto.

-Jes, Vesa, mi diris al vi, nia najbaro estas tre suspektinda persono. Jen venis la polico. Li certe faris iun

krimon kaj ni devas ekscii kian. Mi provis demandi la policanon, sed li nenion diris.

-Jes, Nada, ni devas esti tre atentemaj – diris Vesa. – Kiamaniere ni eksciu kion li faris?

-Certe la polico suspektas lin pri la malapero de la filino de doktoro Veselinov – diris Nada. – Kelkfoje oni vidis lin veturigi Klara-n per sia aŭto. Fiulo. Aĝa viro amindumas dekokjaran knabinon. Oni devus tuj aresti lin.

-Verŝajne vi pravas. Tre suspektinda ulo li estas – kapjesis Vesa. – Plurfoje mi aŭdis pri similaj perversaj viroj. Ili allogas junulinojn, perfortas kaj poste mortigas ilin. Vi certe memoras la teruran okazon antaŭ kelkaj jaroj en Burgo. Kvindekjara fiulo komencis konversacii kun dekjara knabino, li donis al ŝi monon, kelkfoje renkontiĝis kaŝe kun ŝi, poste allogis ŝin en sian loĝejon, perfortis ŝin, sufokis ŝin kaj provis en granda valizo porti ŝian korpon kaj ĵeti ŝin en la maron. La polico kaptis lin, sed bedaŭrinde la knabino mortis.

-Jes. Estas teruraj kruelaj uloj. Mi demandos la estron de nia polico. Majoro Tenev, li nepre diros al mi kion faris nia najbaro. Mi kaj la edzino de la poliestro estas amikinoj. Mi ofte gastas al ili – diris Nada.

-Nepre demandu. Por ni tio gravas. Ni devas scii kia homo estas nia najbaro.

-Hodiaŭ mi iros en la domon de Tenev, mi parolos kun Dima, lia edzino, kaj poste mi diros al vi.

-Tre bone.

14.

Kafejo “Brizo”, kiu troviĝis proksime al la ĉefa stacidomo kaj la haveno ne estis granda, nur kelkaj tabloj estis en ĝi. De ĝia fenestro vidiĝis la stacidomo, la vagonaroj, kaj la haveno, la ŝipoj, kiuj estis tie, kaj la altaj gruoj de la haveno.

Rumen Kolev vestita ne en polica uniformo, sed en ĝinzo kaj verda sporta jako, sidis ĉe unu el la tabloj kaj trinkis

kafon. Li atendis la informanton de la polico, Simeon Nenov, kiu devis veni je la kvina horo ĉi tien. La horloĝmontriloj jam montris la kvinan kaj kvin minutojn kaj Rumen sciis, ke nur post minuto Simeon estos en la kafejo.

Li ĉirkaŭrigardis. “Brizo” ne estis luksa kafejo kaj preskaŭ ĉiam malplenis. Nun ĉe la tablo, proksime al la enirejo, sidis gejunuloj, verŝajne geamantoj, kiuj mallaŭte konversaciis.

La pordo malfermiĝis kaj eniris Simeon, ĉirkaŭ tridekjara, ne tre alta kun forta atleta korpo kaj blonda kiel pajlo hararo. Simeon estis sportisto naĝanto, sed jam de kelkaj jaroj li ne aktive sportis. Nun li estis naĝtrejnisto, konis multajn junulojn kaj pro tio li estis bona informanto. Simeon ĉiam povis ekscii kion planas la junuloj, kiuj distribuas narkotaĵojn aŭ faras diversajn krimagojn.

Jam de la pordo Simeon rimarkis Rumen-on kaj ekiris al la tablo, ĉe kiu li sidis.

-Saluton – diris Simeon.

-Saluton – respondis Rumen. – Kio novas?

-Nenio. Nenion mi eksciis pri Klara. Mi estis en kelkaj dancklubejoj kaj mi demandis miajn konatojn, kiuj ofte vizitas la dancklubejojn. Iuj el ili memoris Klara-n, sed de kelkaj tagoj ili ne vidis ŝin. Aliaj menciis, ke fojfoje ili vidis ŝin en la dancklubejo “Nimfo” kun Filip, gruiŝto, kiu laboras ĉe la haveno.

-Jes. Filip malaperis – diris Rumen. – Ni pridemandis lin, sed li kaŝis sin ie.

-Se Filip kaŝis sin, tio signifas, ke li scias kie estas Klara – konkludis Simeon. – La polico nepre devas trovi lin.

-Jes. Ni serĉas lin kaj mi esperas, ke baldaŭ ni trovos lin. Li ne povas longe kaŝi sin – diris Rumen.

-Tamen la polico devas serĉi Klara-n. Tio same urĝas – emfazis Simeon.

En tiu ĉi momento en la kafejon eniris junulino kun vojaĝsako. Ĉirkaŭ dudekjara ŝi estis svelta kun longaj nigraj haroj kaj nigraj okuloj kiel maturaj ĉerizoj. Vestita en mallonga

ruĝa mantelo, la junulino aspektis eĉ eleganta. Ŝi ekiris al unu el la tabloj, sed subite ŝi rimarkis Rumen kaj proksimiĝis al li.

-Bonan tagon, sinjoro – salutis ŝi Rumen.

Li alrigardis ŝin kaj deziris ŝajnigi, ke li ne konas ŝin, sed la junulino rapide alparolis lin.

-Mi deziras ankoraŭfoje danki al vi – diris ŝi.

Rumen iom ekridetis.

-Vi savis min – daŭrigis la junulino. – Mi estis en tiu loĝejo, de kiu vi liberigis min.

Jes, la junulino estis en la sekreta bordelo.

-Tiam mi venis en Burgon, ĉar en ĵurnalo mi legis anoncon, ke en restoracio oni dungos kelnerinon - komencis klarigi la junulino. – Mi venis de mia vilaĝo labori ĉi tie, tamen okazis, ke oni prenis mian personan legitimilon kaj fermis min en tiu loĝejo.

-Jes – diris Rumen. – Ĉu nun vi vojaĝos ien? – kaj li alrigardis ŝian vojaĝsakon.

-Jes, post dudek minutoj mi ekveturos trajne al mia vilaĝo. Mi venis trinki unu kafon antaŭ la ekveturo.

-Mi deziras al vi bonan veturadon – diris Rumen.

-Dankon. Mi plu ne estos tiel naiva – murmuris la junulino.

-Estonte estu pli atentema – avertis ŝin Rumen.

-Ankoraŭfoje mi dankas – diris la junulino kaj eksidis ĉe unu el la tabloj.

Rumen kaj Simeon daŭrigis la konversacion.

-Ni daŭrigos urĝe serĉi Klara-n – diris Rumen al Simeon. – Se vi ekscios ion, tuj informu nin.

-Kompreneble – kapjesis Simeon.

15.

La 22 -an de aprilo

Burgo ne estis tre granda urbo. En ĝi okazis krimagoj, ŝteloj, murdoj, sed ĝis nun la polico ĉiam trovis kaj la murdiston kaj la murdiston.

Klara Veselinova malaperis la 15-an de aprilo kaj ĝis nun de ŝi ne estis signo. Io mistera kaj nekomprenebla estas en tiu ĉi malapero. La 15-an de aprilo je la unua horo Klara eliris el la lernejo kune kun sia samklasano Veronika Kambova. Klara diris al Veronika, ke iom pli malfrue ŝi revenos en Marinon. Veronika ekiris al la aŭtobushaltejo por Marino kaj Klara – al la centro de Burgo. Post tiu ĉi momento pri Klara ne estas signo, nek informo. Neniu plu vidis ŝin kaj neniu scias kien ŝi iris. Kvazaŭ Klara dronis sub la tero.

Ne tre multaj estas ŝiaj konatoj. Krom la gepatroj kaj samklasanoj, preskaŭ neniu scias ion pri ŝi. Klara konis junulon, kies nomo estas Filip Markov – gruiso ĉe la haveno. Antaŭnelonge ŝi konatiĝis kun Vlad Ezokov – eksĵurnalisto, verkisto. Filip certe amis Klara-n, sed ŝi verŝajne ne estis allogita de li. Ili renkontiĝis de tempo al tempo, sed ne havis amrilatojn. Filip estis iom eksplodema, minacis Klara-n, sed Safirov jam certis, ke li ne kulpas pri la malapero de Klara. Filip tamen ektimiĝis kaj same malaperis.

Vlad Ezokov nur kelkfoje renkontiĝis kun Klara kaj same ne povis esti suspektinda pri ŝia malapero. Do, kio okazis, demandis sin Safirov? Kiu havas intereson, kialon, deziron, ke Klara malaperu? Se ŝi mem decidis forkuri kaj kaŝi sin, ŝi certe postlasos iun signon kaj post tiom da tagoj ni devis eksci ion pri ŝi. Klara ne havis seriozajn problemojn por forkuri kaj malaperi.

La konversacioj kun Filip Markov kaj Vlad Ezokov ne donis multajn rezultojn kaj ne helpis la solvon de la enigmo. La foto de Klara estis sendita al la najbaraj urboj, kelkfoje la loka

televido montris la foton kaj anoncis, ke Klara Veselinova malaperis kaj oni petis, ke se hazarde iu scias ion pri ŝi, tuj telefonu al la plej proksima policejo. De tiam kelkaj personoj telefonis, sed okazis, ke la knabinoj, kiujn ili hazarde vidis ie, ne estas Klara. Alvenis ankaŭ falsaj telefon Alvokoj. Do, eĉ la homoj ne povis helpi. La komputilo de Klara same ne helpis. La policaj specialistoj sukcesis malfermi ŝian retpoŝtilon, sed ŝiaj leteroj nenion konkretan montris. Estis leteroj al ŝiaj samklasaninoj, kies enhavo estis ordinara, ligita al ĉiutagaj lernejoj problemoj. Mankis la poŝtelefono de Klara kaj en ŝia hejmo oni ne trovis notlibreton kun adresoj kaj telefonnumeroj.

Nun Safirov devis serĉi aliajn vojojn por la solvo de la mistero. En la kalendaroj de Klara ne estis io, kio aludas pri iaj ŝiaj problemoj aŭ travivaĵoj, ankaŭ ne estis taglibro. Nur la versaĵo, kiun serĝento Rumen Kolev trovis, eble povus diri ion pri ŝi.

Safirov elprenis la notlibreton kaj denove tralegis la versaĵon. Estis klare, ke Klara dediĉis ĝin al iu, sed al kiu? Certe ne al Filip. El la konversacioj kun Veronika kaj Filip Safirov komprenis, ke Klara ne amis Filip-on aŭ ne estis forlogita de li. Filip estis forte enamiĝinta en ŝi, sed ili nur de tempo al tempo renkontiĝis. Ĉu la versaĵo ne estis hazarde dediĉita al Vlad Ezokov? Klara tamen ne bone konis Ezokov-on. Eble kelkfoje ili konversaciis pri poezio, literaturo kaj inter ili certe ne estis amo.

Tamen la versaĵo kaŝas iun sekreton, verŝajne povas doni respondon pri la malapero de Klara kaj la kialo pri la malapero povas esti amo. Safirov denove relegis la versaĵon. Ĝi jam estas enigmo, kiun li devis solvi kaj la solvo estas en la vortoj, kiujn Safirov devis atente deĉifri:

*Vi estas mia okulo al la mondo,
vi estas mia lumo en la nokto.
Vi kiel vino ebriigas min,
kiel Drako vi flamigas min.*

*Kiam kontempladas mi la maron,
vidas vian helrigardon.*

Safirov ekstaris de la seĝo kaj iom promenis en la kabineto. Preskaŭ ĉiuj enamiĝintaj knabinoj verkas poemojn, per kiuj esprimas siajn sentojn. La versoj helpas ilin diri tion, kion ili deziras, al la knaboj, kiujn ili ekamis. Tamen ne nur knabinoj verkas poemojn. Safirov memoris, ke kiam li estis lernanto, adoleskulo, li same verkis versaĵojn. En lia klaso en la gimnazio estis tre bela, tre alloga knabino. Galja ŝi nomiĝis kaj ege plaĉis al li. Ĉion eblan Safirov faris por esti ŝia amiko. Ofte li alparolis ŝin en la lernejo, sekvis ŝin post la fino de la lecionoj, atendis ŝin antaŭ la pordo de ŝia domo, sed Galja kvazaŭ ne rimarkis lin. La fortaj sentoj turmentis lin. Nokte li songĝis pri Galja, en la songĝoj parolis al ŝi, tage verkis poemojn, kiujn dediĉis al ŝi kaj kaŝe ŝovis ilin en ŝiajn kajerojn.

Galja havis neordinarajn grandajn verdajn okulojn, kiuj ebriigis kaj flamigis lin kiel diris Klara en sia versaĵo. Tri jarojn Kalojan Safirov lernis kun Galja en unu sama klaso, sed bedaŭrinde ili ne iĝis amikoj. Vane Kalojan provis inviti Galjan al rendevuo, revis promenadi kun ŝi, konversacii kun ŝi, esti kun ŝi en kinejo, en parko, sed ne eblis. Verŝajne Kalojan ne plaĉis al Galja aŭ ŝi havis alian koramikon pri kiu Kalojan ne sciis.

Post la fino de la gimnazio ĉiuj lernantoj ekiris sur diversajn vojojn. Safirov iĝis studento en la ĉefurbo. Galja ekloĝis en alia urbo, kie edziniĝis. Safirov same edziĝis kaj neniam plu li renkontis ŝin. Tamen eĉ nun, kiam li rememoris ŝin, li tuj vidis ŝiajn brilajn verdajn okulojn, kiuj denove ebriigis kaj flamigis lin.

Safirov alrigardis la versaĵon de Klara kaj nevole demandis sin kial en la verso “kiel Drako vi flamigas min” la vorto “drako” estas skribita per majusklo. Ĉu estis preseraro?

En tiu ĉi momento aŭdiĝis frapeto ĉe la pordo de la kabineto.

-Bonvolu – diris Safirov.

Eniris Rumen Kolev.

-Bonan tagon, sinjoro komisaro – salutis Kolev.

-Bonan tagon, Kolev. Kio novas?

-Bedaŭrinde nenio, sinjoro komisaro. Ni daŭre ricevas telefonalkvokojn pri knabinoj. Tuj niaj kolegoj kontrolas la informojn, sed neniu el tiuj knabinoj, pri kiuj oni informas nin, estas Klara.

-Ĉu estas informo pri Filip Markov? Ĉu vi trovis lin? – demandis Safirov.

-Ankoraŭ ne. Li kiel Klara dronis en la maro, sed mi esperas, ke baldaŭ ni trovos lin. Li certe ne eltenos longe kaŝi sin.

-Jes, ni trovos lin, sed kiel ni trovu Klara-n? – diris Safirov. – Jam pasis ses tagoj kaj mi timas, ke ŝi ne plu vivas.

-La mistero pri ŝia malapero estas granda. Ĝis nun ni ne havis similan okazon – diris Kolev.

-Eble ni jam devas serĉi ne ŝin, sed ŝian kadavron – tre ĉagrene rimarkis Safirov. – Ordonu al nia esplorgupo, ke ili komencu traserĉi la regionon ĉirkaŭ la urbo: la kampojn, la arbaron, sude de Burgo, la strandojn, ĉefe tiujn, kiuj estas pli malproksime kaj pli malofte oni vizitas ilin.

-Eble vi pravas. Ni komencos traserĉi la regionon ĉirkaŭ la urbo. Estus bedaŭrinde se Klara ne plu vivas. Juna, bela ŝi estas. Mi eĉ ne povas imagi la tragedion de ŝiaj gepatroj – diris Kolev.

-Tamen ni ankoraŭ ne pensu pri tio. Ni ne perdu la esperon – diris Safirov. – tamen diru al mi, Kolev, ĉu kiam vi estis lernanto, vi enamiĝis?

-Kompreneble, sinjoro komisaro. Tiam mi plurfoje enamiĝis. En nia lernejo lernis multaj belaj knabinoj kaj mi enamiĝis en multaj el ili.

-Nekredeble! Ĉu tiam vi verkis poemojn kaj ĉu dediĉis ilin al la knabinoj, kiujn vi amis? – demandis scivole Safirov.

-Sincere dirite, sinjoro komisaro – ne. Mi ne verkis poemojn. Mi ne tre ŝatis literaturon. Ĉiam mi havis malbonajn notojn pri literaturo. Nia instruisto estis tre severa, postulema kaj mi neniam sukcesis ricevi iun pli bonan noton pri tiu ĉi studobjekto. Anstataŭ ampoemojn, mi donacis al la knabinoj florojn kaj ŝajnis al mi, ke al ili pli plaĉis la floroj ol la ampoemoj.

-Do, mi komprenas. Vi estis granda Don Ĵuano. Tamen vi memorigis min, ke delonge mi ne donacis florojn al mia edzino. Baldaŭ estos datreveno de nia edziĝfesto kaj mi ne forgesu donaci al ŝi florojn.

-Mi venis informi vin, sinjoro komisaro, ke mi devas iri al Marino por redoni al familio Veselinovi la komputilon de Klara. Kiel vi scias, niaj kolegoj sukcesis malfermi ŝian retpoŝtilon, ni tralegis ŝiajn leterojn, sed de ili nenion gravan ni eksciis.

-Bone. Iru. Se estas io, telefonu al mi kaj mi same telefonos al vi – diris Safirov.

-Ĝis revido – kaj Rumen Kolev eliris.

16.

La 23-an de aprilo

Matene, kiam Safirov venis en la policejon, li tuj telefonis al Vlad Ezokov.

-Halo – aŭdiĝis la voĉo de Vlad.

-Bonan matenon, sinjoro Ezokov – diris Safirov. – Telefonas komisaro Safirov. Mi ŝatus konversacii kun vi.

-Ĉu denove rilate Klara-n Veselinova-n? – demandis Vlad.

-Jes, denove.

-Ĉu vi ankoraŭ ne trovis ŝin?

-Bedaŭrinde ankoraŭ ne.

-Ĉion, kion mi sciis pri ŝi, mi rakontis al vi! – iom kolere diris Vlad. – Nenion plu mi povus aldoni al tio.

-Verŝajne vi rememoros ankoraŭ ion pri ŝi? – diris enigme Safirov.

-Mi klarigis al vi, ke kun tiu ĉi knabino mi renkontiĝis nur tri aŭ kvar fojojn.

-Tamen mi petas vin veni hodiaŭ en la ĉefpolicejon en Burgo – diris Safirov.

-Kio signifas tion? Ĉu mi estas suspektita – demandis Vlad – kaj ĉu mi venu kun advokato?

-Tute ne. Vi ne bezonas advokaton kaj vi ne estas suspektita – certigis lin Safirov. – Mi nur deziras starigi al vi ankoraŭ kelkajn demandojn.

-Bone – konsentis Vlad. – Post unu horo mi venos kaj mi estos ĝoja, se mi helpus vin.

-Dankon, sinjoro Ezokov, mi atendas vin – diris Safirov kaj alrigardis sian brakhorloĝon. Estis la naŭa horo kaj je la deka Vlad devis estis ĉi tie.

Vlad serioze koleriĝis. Li ĵus komencis verki, kiam Safirov telefonis kaj ĉesigis lian verkadon.

-Diable! – diris Vlad. – Kiam mi komencis verki, mi forgesis malŝalti la poŝtelefonon kaj jen oni tuj telefonis al mi.

Hodiaŭ li planis tutan tagon verki. Jam la enhavo de la romano estis preskaŭ klara kaj li devis nur ĉiutage diligente verki. Tial li venis kaj ekloĝis en Marino por trankvile verki, sed bedaŭrinde lia hodiaŭa plano fiaskis. Nun li devis ekveturi al Burgo por renkontiĝi kun komisaro Safirov kaj Vlad tute ne komprenis kion ankoraŭ deziras aŭdi de li Safirov pri Klara.

Vlad lasis ĉion sur la tablo: la paperfoliojn, la skribilon, la notojn, kiujn li faris sur paperetojn antaŭ la komenco de la verkado. Li kutimis verki mane, kvankam li havis komputilon. Kiam li estis ĵurnalisto, li konstante verkis komputile kaj tio jam tedis lin. Nun li komencis verki la romanon manskribe kaj

ŝajnis al li, ke kiam li skribas mane, liaj pensoj fluas kiel rivero kaj ĉio, kion li verkas, estas pli klara kaj pli elokventa.

Hejme Vlad surhavis ĝinzon kaj verdan T-ĉemizon, sed por iri en la urbon li surmetis helbrunan kostumon, bluan ĉemizon kaj ligis al si malhelruĝan kravaton. Vlad eliris, ŝloŝis la pordon kaj ekiris al la aŭto, kiu estis en la korto. Tuj li rimarkis, ke la najbarino, Nada, denove gvatis lin kaj eble demandis sin kien li iras, ĉar ŝi vidis, ke antaŭ duonhoro li revenis de sia ĉiumatena promenado ĉe la maro. Vlad ŝajnigis, ke ne vidas ŝin, eniris la aŭton, funkciigis ĝin kaj ekveturis.

Survoje li ne ĉesis mediti pri Klara. Kiel ŝi malaperis? Li jam bedaŭris, ke tiam, kiam pluvigis, li alparolis ŝin kaj Veronika-n kaj proponis veturigi ilin al Burgo. “Jen kio okazis – diris al si mem Vlad. – Klara malaperis kaj nun mi estas unu el la suspektitoj pri ŝia malapero. La komisaro diris, ke oni ne suspektas min, sed jam duan fojon li pridemandos min kaj mi ne scias kion li deziras aŭdi de mi? Eble li supozas, ke mi estas la kialo de ŝia malapero.”

Kiam Vlad eniris la kabineton, Safirov diris:

-Rapide vi alvenis.

-Jes. Mi havas laboron kaj estos bone, ke la pridemandado finiĝu pli rapide – diris li.

-Vi verkas romanon, ĉu ne? – iomete ekridetis Safirov.

-Jes.

-Ne forgesu. Vi promesis, ke mi estos inter la unuaj legantoj, kiuj tralegos ĝin – memorigis lin Safirov.

-Mi ne forgesis.

-Kio estas la titolo de la romano? – demandis la komisaro.

-“Serenaj matenoj” – respondis Vlad.

-“Serenaj matenoj”, interesa titolo. Kaj pri kio temas?

-Se mi diros al vi pri kio temas, vi ne havos intereson tralegi ĝin – rimarkis Vlad.

-Eble vi pravas.

-Mi nur diros, ke la agokampo de la romano estas Marino kaj la urbo Burgo.

-Ĉu hazarde mi ne estas unu el la ĉefherooj? – scivolis Safirov.

-Povas esti, sed nenion plu mi diros pri la romano. Ja, vi ne vokis min ĉi tien por pridemandi min pri la romano, ĉu?

-Ne – diris Safirov. – Mi vokis vin, ĉar kiam ni konversaciis antaŭ kelkaj tagoj, vi menciis, ke Klara Veselinova montris al vi siajn versaĵojn kaj petis vin diri vian opinion pri ili.

-Jes.

-Verŝajne vi atente tralegis ilin kaj diris vian opinion?

-Mi tralegis ilin, poste ni renkontiĝis kaj mi diris al ŝi kion mi opinias pri ili – klarigis Vlad.

-Tre bone – diris Safirov. – Ni trovis ŝian notlibreton kaj en ĝi unu solan versaĵon, kiu ne havas titolon. Mi kelkfoje tralegis tiun ĉi versaĵon kaj ŝajnas al mi, ke ĝi enhavas ion interesan. Kiam mi legas ĝin, mi kvazaŭ legas enigmon, kiun mi devas solvi. Tial mi vokis vin. Mi deziras montri al vi tiun ĉi versaĵon – diris Safirov. – Vi tralegis aliajn versaĵojn de Klara. Bonvolu tralegi ankaŭ tiun ĉi kaj diri ĉu ĝi aludas ion aŭ eble nur al mi ŝajnas tiel.

Safirov donis la notlibreton al Vlad, kiu komencis legi la versaĵon. Dum li legis ĝin, Safirov silentis kaj atente observis lin. Kiam Vlad fermis la notlibreton, Safirov demandis:

-Ĉu la versaĵo vekis en vi ian asocion aŭ ĉu vi trovas en ĝi ion neordinaran?

Vlad iom meditis kaj ne tuj respondis.

-Aŭ eble io impresis vin?

-Jes. – diris Vlad. – Mi rimarkis, ke la vorto “drako” estas skribita per majusklo. Eble tio ne vekus mian atenton, sed strange en la aliaj versaĵoj de Klara, kiujn mi tralegis, ofte estis tiu ĉi vorto kaj ĉiam ĝi estis skribita per majusklo. Nun mi ne povas diri kial ŝi skribis “drakon” per majusklo. Estas tute

nekompreneble. Legante la versaĵojn mi konstatis, ke Klara bone posedas la gramatikon kaj skribi “drako” per majusklo estas nekompreneble.

-Jes. Mi same rimarkis tion kaj mi ne trovas klarigon – diris Safirov.

-Kiam mi legis la versaĵojn estas klare, ke Klara dediĉis ilin al iu, kiun ŝi forte amas. Kompreneble nenie ŝi mencias lian nomon, sed el la versaĵoj videblis, ke li allogis ŝin. Klara ne nur amas lin, sed estimas kaj admiras lian fizikan kaj spiritan personecon. Li ravis ŝin – konkludis Vlad.

-Viaj meditoj estas interesaj. Estas tute nature, ke knabino kiel Klara enamiĝis en iu, kiu ravis ŝin per sia fizika kaj spirita personeco kiel vi diris – konstatis Safirov.

-Jes.

-Do. Ni devas serĉi lin. Kiu li estas kaj de kie Klara konas lin?

-Certe – diris Vlad.

-Ne estos facile – diris Safirov kvazaŭ al si mem. – Se mi devas esti sincera, mi unue pensis pri vi – kaj li alrigardis Vlad-on, – sed poste mi konstatis, ke dum tiom da mallonga tempo Klara ne povus enamiĝi en vi.

-Vi pravas. La tempo dum kiu ni renkontiĝis estis tre mallonga. Krom tio mi ne permesus al mi, ke iu neplenkreska knabino ekamu min.

-Mi dankas vin pro la helpo – diris Safirov. – Dank’ al vi mi povis pli bone kompreni la versaĵon de Klara. Mi esperas, ke vi ne protestus, se mi denove petus vian helpon? – demandis Safirov.

-Ĉu vi deziras dungi min? – ekridetis Vlad.

-Kial ne. En la polico estas psikologoj kaj certe necesos verkistoj, literaturkritikistoj – ekridetis same Safirov. – Mi deziras al vi agrablan tagon kaj sukcesan verkadon. Verŝajne hodiaŭ vi povus daŭrigi la verkadon de la via romano.

17.

La 24-an de aprilo

Kabo Otmanli estis pitoreska loko je dek kilometroj sude de Burgo en arbaro, kiu vastiĝis al la mara bordo. Iuj el la loĝantoj de Burgo havis ĉi tie vilaojn. La areo de Otmanli estis arbara kaj en la centro de la arbaro troviĝis placo, kie estis nutraĵvendejo kaj restoracio, kiuj tamen funkciis ĉefe somere. La vilaoj, kvazaŭ disĵetitaj en la arbaro, estis malproksimaj unu de alia kaj iliaj posedantoj venadis al ili ĉefe somere. Dum la aliaj sezonoj, la etaj lignaj domoj kviete dormetis sub la branĉoj de altaj kverkoj kaj fagoj.

Somere multaj loĝantoj de Burgo venis al Otmanli sabate kaj dimanĉe por pasigi kelkajn ripozajn tagojn. Iuj el ili tranoktis en tendoj kaj piknikis sur la arbaraj herbejoj. Ĉi tie ne estis plaĝo. Ĉe la mara bordo altiĝis krutaj rokoj kaj nur ie-tie inter ili videblis etaj sablaj lokoj kun multaj akraj ŝtonoj.

Marin kaj Angel, junuloj fiŝkaptistoj el Burgo, frumatene ekiris fiŝkaptadi kaj eknaĝis per boato de Burgo al Otmanli, ĉar tie la maro estis trankvila kun pli da fiŝoj. La du amikoj estis pasiaj fiŝkaptistoj kaj kiam la vetero estis bona ili rapidis fiŝkaptadi. Por Angel la fiŝkaptado estis lia ĉefa okupo. Dudekdujara li jam de la infaneco fiŝkaptadis. Lia patro estis fiŝkaptisto kaj Angel lernis la fiŝkaptadon de li. Forta, energia kun nigraj okuloj kaj densa hararo, Angel estis vera mara homo. Perfekta naĝanto, li pasigis pli da tempo en la maro ol sur la bordo.

Marin, lia amiko, estis seruristo en fabriko en Burgo. Kiam li estis libera, helpis Angel-on fiŝkaptadi. Marin same tre ŝatis la maron kaj plej bone fartis, kiam kun Angel fiŝkaptadis. Nun, en aprilo, ankoraŭ ne eblis naĝi, sed por fiŝkaptado la vetero estis bonega. La mateno iom friskis kaj serenis. La suno, kiu lante aperis oriente, lumigis la vizaĝojn de la junuloj kaj la mara vento karesis ilin. La boato glitiĝis sur la negrandaj ondoj

kaj rapide proksimiĝis al Otmanli. Jam videblis la altaj krutaj rokoj ĉe la bordo, similaj al grandegaj senmovaj gardistoj.

Angel elektis oportunan lokon kaj ambaŭ amikoj preparis la fiŝhokojn. Hodiaŭ ili certe havos ŝancon kaj la fiŝoj, ĉefe gobioj, kiujn ili kaptos, estos multaj. Angel proponis, ke ili proksimigu la boaton iom al la bordo.

-Tie – li diris kaj montris mane – inter la rokoj estas eta golfo, kie kolektiĝas pli da fiŝoj.

-Bone – konsentis Marin.

Ili ekremis kaj la boato malrapide direktiĝis tien. Jam bone videblis la eta sabla spaco inter la altaj rokoj. Subite Angel ekstaris en la boato kaj ekscitite diris al Marin:

-Vidu tie, ĉe la ondoj, kuŝas iu!

-Ĉu? – Marin ekrigardis al la rokoj kaj stariĝis ankaŭ.

Sur la sablo estis homa korpo kaj la ondoj surverŝis ĝin. La junuloj komencis pli rapide remi. Kiam la boato estis je kelkaj metroj de la bordo, ili klare vidis, ke sur la sablo estas korpo de knabino.

-Ŝi ne estas viva – diris Angel.

-Verŝajne ŝi falis de supre, de la rokoj – supozis Marin.
– Ĉi tien neniu povas veni. De la bordo, neniu vidis kaj ne povis helpi ŝin. Ŝi videblas nur de la maro...

-Tial ni rimarkis ŝin.

-Kion ni faru? – diris maltrankvile Marin.

-Ni tuj telefonu al la polico en Burgo – kaj Angel elprenis sian poŝtelefonon. – La polico venos per kutro kaj prenos la korpon.

Angel rapide telefonis.

-Halo? – aŭdiĝis voĉo.

-Ĉu estas la deĵoranta policano en Burgo? – demandis Angel.

-Jes.

-Mi deziras sciigi vin pri knabino, kiu mortis. Mi kaj mia amiko vidis ŝin.

-Kie? – demandis la policano.

-En Otmanli ĉe la altaj rokoj ĉe la bordo. Vi devas veni per kutro, ĉar de la bordo vi ne povas proksimiĝi al la loko, kie ŝi kuŝas.

-Kiamaniere vi vidis ŝin?

-Ni estas fiŝkaptistoj kun boato kaj ni rimarkis la kadavron de la maro.

-Bone ni venos, sed vi restu tie – diris la deĵoranta policano.

-Bone.

-Nia hodiaŭa fiŝkaptado fiaskis – rimarkis Marin.

-Jes. Ni havis malŝancon trovi tiun ĉi knabinon – diris Angel.

Ambaŭ restis en la boato por atendi la policanojn. Sur la bordo la ondoj daŭre surverŝis la korpon de la knabino. De la boato videblis, ke ŝi verŝajne estas tre juna, blondhara, vestita en ruĝa jako kaj en ĝinzo.

-Strange. Kio okazis al ŝi? – demandis Marin.

-Eble ŝi promenadis tie supre kaj falis. Certe estis sola, neniŭ vidis ŝin. Eble oni serĉis ŝin, sed ne sciis kie ŝi estas. Neniŭ supozis, ke ŝi falis ĉi tien. Ja, de nenie oni povas vidi ŝin, nek de supre, nek de la bordo, nur de la maro – diris Angel.

Post horo ili vidis la polican kutron, kiu rapide venis.

-La policanoj jam estas ĉi tie – diris Angel.

-Saluton junuloj, – salutis ilin altstatura polica kapitano, kiam la kutro proksimiĝis al ilia boato.

-Jen – montris Angel – la knabino kuŝas tie.

-Ni tuj prenos ŝin – diris la kapitano. – Vi tamen restu ĉi tie. Diru al policano Milev viajn nomojn kaj adresojn, ĉar vi estas atestantoj.

Angel diktis al la policano siajn nomon kaj adreson kaj ankaŭ la nomon kaj la adreson de Marin.

-Bone – diris la policano. – Nun vi povas foriri. Kiam estos necese, ni kontaktos vin.

Angel funkciigis la motoron de la boato kaj ili malproksimiĝis.

Rumen Kolev eniris la kabineton de Safirov kaj tuj diris:

-Malbona novaĵo, sinjoro komisaro.

Safirov stariĝis de la seĝo.

-Oni trovis Klara-n Veselinova-n mortinta.

Safirov nenion diris. Li supozis tion. Dum dek tagoj ili ne sukcesis trovi ŝin kaj estis klare, ke ŝi mortis.

-Kie oni trovis ŝin? – demandis Safirov.

-En Otmanli. Du junuloj, fiŝkaptistoj, rimarkis ŝian korpon sur la mara bordo. Verŝajne ŝi falis de la rokoj – klarigis Kolev.

-Tamen kion ŝi faris en Otmanli? Ĝi estas je dek kilometroj de Burgo? – demandis Safirov.

-Tio estas la bona demando – diris Kolev.

-Unue ni devas iri al Otmanli kaj bone trarigardi la lokon, kie oni trovis Klara-n. Due ni ricevu la rezultojn de la nekroskopia por kompreni kiel ŝi mortis. Ni devas tuj sciigi la gepatrojn de Klara. Tion mi faros – diris Safirov.

Kolev eliris el la kabineto kaj Safirov restis sola. Nun la demandoj pri Klara iĝis pli komplikaj. Ĉu ŝi mortis falante de la rokoj aŭ iu mortigis ŝin kaj ĵetis ŝin de tie? Kial ŝi estis en Otmanli kaj ĉu ŝi estis sola aŭ kun iu? Kio ĝuste okazis tie kaj kiam? La demandoj aperis unu post alia kaj kiel svarmo de rabaj birdoj atakis Safirov-on. Li devis ordigi ilin kaj respondi al ili. Evidentiĝis, ke la enigmoj, ligitaj al Klara multobliĝis kaj Safirov ne komprenis kial kun dekokjara knabino okazis tio.

Nun la plej malfacila tasko estis informi la gepatrojn de Klara pri ŝia forpaso. Dum sia kariero ne unufoje Safirov devis fari tian funebran sciigon. Ĉiam li profunde travivis la tragedion de la gepatroj kaj la parencoj, kiam ilian infanon aŭ

parencon oni trovis murdita aŭ morta. Nun tiu ĉi tragedio estis multe pli granda. Temis pri dekokjara knabino, bela, saĝa, emocia. Kiel la gepatroj travivus la forpason de Klara. Tamen Safirov devis plenumi sian ofican devon. Li sentis konscienciproĉon, ke ne sukcesis trovi Klara-n viva. “Ĉu mi faris ĉion por trovi ŝin – demandis sin Safirov. – Ĉu mi pridemandis ĉiujn, kiuj bone konis ŝin? Ĉu mi trovis spurojn, kiuj montrus al mi kie povus esti Klara?”

Nun Safirov konstatis, ke kiam la polico serĉis Klara-n, ĝi ne estis sur la ĝusta vojo. Oni pridemandis kelkajn personojn, kiuj ne multe helpis kaj tial Safirov sentis sin kulpa. Tamen nun en li kiel tajdo altiĝis la ambicio trovi la murdiston de Klara, ĉar Safirov supozis, ke ŝi ne falis de la rokoj, sed iu murdis ŝin. Li pretis tuj komenci la esplorojn kaj tio estus la sola rekompenco, malgraŭ la granda ĉagreno.

18.

La 26-an de aprilo

La aŭto de Safirov haltis antaŭ la domo de familio Veselinovi. Safirov eliris el ĝi, eniris la korton, paŝis al la domo kaj sonoris. La pordon malfermis Darina. Kiam ŝi vidis lin, ŝi stuporiĝis kaj ŝiaj belaj mielkoloraj okuloj grandiĝis pro timo. Kiel ĉiuj patrinaj, ŝi intuicie antaŭsentis, ke Safirov venas sciigi ilin pri io malbona. Darina ne havis forton ekparoli. Ŝi nur pli larĝe malfermis la pordon kaj li eniris.

En la gastĉambro estis Dobri, la patro de Klara, kiu mallaŭte salutis Safirov-on:

-Bonvenon, sinjoro komisaro.

-Bonan tagon – respondis Safirov kaj tuj tra lia konscio trakuris la penso, ke la tago tute ne estas bona.

Darina kaj Dobri ekstaris senmovaj kaj atendis lian ekparolon. Certe de lia rigardo ili divenis la teruran sciigon. Pene, animstreĉe Safirov komencis:

-Kun granda bedaŭro mi devas sciigi vin, ke ni trovis Klara-n mortinta. Mi scias, ke por vi tio estas grandega tragedio. Bonvolu akcepti miajn profundajn sincerajn kondolencojn.

Darina eksplodis en plorejo. Dobri restis senmova, sed en liaj okuloj aperis larmoj, kiuj ekfluis sur liajn nerazitajn vangojn. Darina voĉe ploris kaj flustris:

-Klara, Klara ido mia dolĉa...

-Kie vi trovis ŝin? – demandis Dobri.

-En Otmanli – respondis Safirov.

-En Otmanli! – ne kredis Dobri. – Kial tie?

-Mi mem ne scias, sed ni tuj komencos la esplorojn por kompreni kial Klara estis tie.

-En Otmanli... – flustris Dobri.

Subite Darina alrigardis Safirov-on kaj mallaŭte diris:

-En Otmanli ni havas vilaon.

-Jes – aldonis Dobri. – Tie ni havas vilaon. Ĉu Klara estis en ĝi?

-Ni kontrolos tion – diris Safirov. – Ni devas iri en vian vilaon kaj vidi ĉu Klara estis en ĝi dum tiuj ĉi tagoj, kiam ni serĉis ŝin.

-Ni montros al vi la vilaon – aldonis Dobri. – Ni, sinjoro komisaro, tre malofte iras tien. Nur somere ni pasigas kelkajn tagojn en Otmanli. Al Klara tamen la vilao plaĉis kaj de tempo al tempo ŝi iris tien sola. Ni kompreneble ne kontraŭstaris kaj permesis al ŝi iri tien, ĉar en tio nenion malbonan kaj strangan ni vidis – klarigis Dobri.

-Eble tie ŝi estis sola aŭ kun iu alia? – supozis Safirov.
– Tion ni konstato, kiam ni trarigardos la vilaon.

-Jes – konsentis Dobri.

-Ĉu estas viaj konatoj aŭ amikoj, kiuj same havas vilaon en Otmanli? – demandis Safirov.

-Ne. Eble vi scias, ke tie ne estas multaj vilaoj kaj ili troviĝas sufiĉe malproksime unu de alia. La plej proksima vilao al nia estas je kvincent metroj kaj ni ne scias kies ĝi estas. Ni

ne konas ĝiajn posedantojn, ĉar ili same tre malofte iras tien – diris Dobri.

-Sed... – Darina viŝis per poŝtuko la larmojn, alrigardis Safirov-on kaj diris:

-Sed foje Klara menciis, ke tie, en Otmanli, vilaon havas Drakov.

-Kiu estas Drakov? – tuj demandis Safirov.

-Ŝia klasestro, la instruisto pri literaturo. Krasen Drakov. Mi tamen ne scias kie ĝuste estas lia vilao.

-Ĉu Drakov? Interesa familia nomo – rimarkis Safirov. – Tre malmultaj estas tiuj ĉi familiaj nomoj – kaj Safirov tuj rememoris la versaĵon de Klara, en kiu la vorto “drako” estis skribita per majusklo.

“Ĉu ne estas ia ligo inter Drakov kaj “drako”, demandis sin Safirov”.

-Nun vi havos multajn zorgojn – diris li. - Eble post du tagoj oni transdonos al vi la korpon de Klara kaj vi devas prizorgi la funebran ceremonion, sed morgaŭ ni nepre devas iri al Otmanli en la vilaon.

-Jes – diris Dobri. – Ni iros.

-Nun mi deziras al vi fortojn. Havu fortojn kaj volon travivi tiun ĉi grandan tragedion. Mi scias, ke Klara estis bona, kara knabino kaj jam estas en alia, pli bona mondo, kie ne estas doloro, ĉagreno kaj perforto. Mi iros kaj mi ne diros al vi “ĝis revido”, ĉar dum funebro oni ne diras “ĝis revido”.

19.

La 27-an de aprilo

Serĝento Rumen Kolev, kiu estis en la kabineto de Safirov, ekparolis:

-Sinjoro komisaro, ni ricevis la raporton pri la nekropsio de Klara.

-Kaj kio estas?

-Unue Klara Veselinova havis seriozan vundon sur la kapo. Aŭ ŝi falis kaj frapis la kapon je iu akra objekto, aŭ iu frapis ŝin per tre malmola aĵo, verŝajne lignaĵo aŭ io metala. Due, kio estas pli neatendita, ŝi estis graveda trian monaton.

-Ĉu? – surpriziĝis Safirov. Li tute ne atendis tion kaj tiel ekrigardis Rumeno-on Kolev-on, kvazaŭ ne deziris kredi liajn vortojn.

-Jes – kapjesis Kolev. – Ne estas dubo. Niaj kuracistoj konstatis tion.

-Tiu ĉi fakto donas respondon al demandoj, kiuj estis malklaraj. La vundo sur la kapo de Klara verŝajne pruvas mian supozon, ke ŝi estis murdita.

-Tre verŝajne – konsentis Kolev.

-Certe la gravedo de Klara kaj la murdo estas ligitaj – daŭrigis Safirov. – Nun unue ni devas ekscii kiu gravedigis ŝin. Eble tiu, kiu gravedigis ŝin – murdis ŝin – konkludis Safirov.

-Eble – diris Kolev.

-Post duonhoro kun la patro de Klara, doktoro Veselinov, ni iros en Otmanli por trarigardi ilian vilaon, en kiu eble estis Klara dum ni serĉis ŝin. Tie ni faros detalan esploron kaj verŝajne ni ekscios ion gravan pri la murdo. Kolev, bonvolu kunvoki la polican esplorgrupon – diris Safirov.

-Jes, tuj mi kunvokos ĝin.

Post duonhoro du policaj aŭtoj ekveturis de Burgo al Otmanli. En la unua estis Safirov, Kolev kaj la patro de Klara. En la alia – tri policanoj el la polica esplorgrupo. Ili devis detale trarigardi la vilaon kaj serĉi iajn spurojn, kiuj direktos la policon al la murdisto.

Kabo Otmanli estis senhoma kaj silenta. Eta bruo ne aŭdiĝis en la arbaro. Nur de tempo al tempo iu birdo trafugis de branĉo al branĉo. La kabo estis je dudek metroj super la mara nivelo kaj tial ĉi tie ne aŭdiĝis eĉ la mara bruo de la ondobatoj kontraŭ la rokoj sur la bordo.

La aŭtoj plu eniris la arbaron kaj sur mallarĝa vojo, kiu serpentumis inter kverkoj, fagoj kaj arbustoj proksimiĝis al negranda ligna domo.

-Jen – montris doktoro Veselinov. – Tio estas nia vilao.

Ĝi troviĝis sur herbejo kaj ĉirkaŭ ĝi estis la arbaro. Unuetaĝa kun tegola pinta tegmento, la vilao similis al la montodomoj, kiujn oni povus vidi en la altaj montaroj. La vilao havis vastan terason kun ventŝirma muro. De la du flankoj de la pordo estis la fenestroj de la ĉambroj. Veselinov malfermis la pordon, la policanoj eniris vestiblon, en kiu estis pordoj al du ĉambroj.

Unue la policanoj trarigardis la vestiblon, sed nenio en ĝi vekis ilian atenton. Poste ili eniris la maldekstran ĉambron, en kiu estis du litoj, ligna tablo, vestoŝranko kaj kvar seĝoj. La dika polvo sur la mebloj montris, ke delonge neniuj estis ĉi tie. En la alia ĉambro same videblis, ke neniuj eniris ĝin eble de la pasinta somero. En ĝi estis lito, skribotablo, librobretaro. Verŝajne estis la ĉambro de Klara.

-Delonge neniuj venis ĉi tien – konstatis Safirov.

-Ni vidu la kuirejon – proponis Veselinov.

La pordo de la kuirejo estis kontraŭ la enirpordo kaj same en la kuirejon neniuj eniris eble de la somero. La tablo kaj la karbokuirforno estis polvokovritaj.

-Klara ne venis ĉi tien – konkludis Safirov. – Verŝajne ŝi estis ie alie, sed ne ĉi tie.

-Jes. Ĉi tie estis ne ŝi, nek iu alia – aldonis serĝento Kolev. – Videblis, ke dum monatoj neniuj eniris la vilaon.

-Nun ni iru al la rokoj, de kie estis ĵetita Klara – proponis Safirov. – Mi certas, ke ŝi ne falis, sed oni ĵetis ŝin de tie.

La policanoj eliris el la vilao, eniris la aŭtojn kaj ekveturis. La arbara vojo iris al la maro. Post dek minutoj la aŭtoj haltis sur eta herbejo. Ĉi tie, de la roko, videblis la maro.

-Jen – diris Kolev.

Ĉiuj policanoj kaj la patro de Klara proksimiĝis al la rando de la roko kaj alrigardis suben. Estis abismo, profunda eble dudek metrojn. Malsupre videblis mallarĝa sabla areo kun densaj arbustoj kaj akraj ŝtonoj. La maraj ondoj surverŝis la ŝtonojn.

-Tie estis la korpo de Klara – montris malsupren Kolev.

-Jes, iu ĵetis de ĉi tie la korpon – diris Safirov.

La policanoj bone trarigardis la lokon, serĉante spurojn. Videblis spuroj de aŭto, kiu estis ĉi tie.

-Ni devas ekscii kia aŭto venis ĉi tien – diris unu el la policanoj.

-Jes ni esploros la spurojn kaj ni konstatos la markon de la aŭto – aldonis alia policano.

-Kiam ni scias la markon de la aŭto, ni komencos serĉi ĝian posedanton. La spuroj de la radoj helpos nin – diris Safirov.

Por Safirov estis klare, ke tiu, kiu murdis Klara-n alportis ŝian korpon ĉi tien kaj ĵetis ĝin de la roko. La murdisto opiniis, ke la arbustoj, herbaĉoj, ŝtonoj kaŝos la korpon kaj neniu vidos ĝin. Ne eblis malsupreniĝi en la abismo, sed li ne supozis, ke la korpo estus videbla de la maro. La du junuloj, fiŝkaptistoj, kiuj proksimiĝis per la boato al la bordo, rimarkis la korpon de Klara.

“Dank’ al la junuloj ni trovis la korpon de Klara – meditis Safirov. Nun la tasko estas klarigi kial Klara kaj la murdisto estis en Otmanli. Certe la murdisto murdis Klara-n ie alie, povas esti proksime, kaj per aŭto veturigis la korpon ĝis tiu ĉi roko. La murdisto bone konis la ĉirkaŭaĵon kaj sciis, ke se li ĵetos la korpon en tiun ĉi abismon, neniu trovos ĝin, sed li ne bone kalkulis.”

20.

La 28-an de aprilo

La tago, en kiu oni entombigis Klara-n, estis malhela kaj pluva. Jam de la mateno forte pluvis kaj ne estis espero, ke la torenta pluvo baldaŭ ĉesos. Nigraj nuboj, kiel vilaj lupoj, kovris la ĉielon, fulmis kaj surdigaj tondroj skuis la ĉirkaŭaĵon. La maro furiozis. Grandegaj ondoj kruele batis la bordon.

La tombejo de Marino estis malproksime de la urbo. Parencoj, konatoj, geamikoj de Klara per aŭtoj venis al la tombejo. La salono, kie okazis la funebra ceremonio, estis plenplena je homoj. Safirov delonge ne vidis tiom da homoj kaj tiom da floroj. Ĉiuj venis kun bukedo da floroj kaj la salono similis al granda florgardeno.

Inter la ĉeestantoj Safirov vidis Veronika-n kaj ŝian patrinon. Veronika ploris, tenante mane bukedon da ruĝaj tulipoj. Subite Safirov rimarkis Filip-on. Li estis je la angulo de la salono, proksime ĉe la enirejo, kaj provis kaŝi sin malantaŭ la dorsoj de la homoj, kiuj staris antaŭ li. Tamen Safirov bone vidis lin. Filip estis kun okulvitroj kontraŭ la suno, malgraŭ ke la tago estis malhela kaj pluvis. Li surhavis nigran ĉemizon, nigran pantalonon kaj tenis mane bukedon da blankaj hiacintoj.

“Li aperis, diris al si mem Safirov, kaj li ekhavis kuraĝon veni ĉi tien. Certe Filip amis Klara-n.” Safirov tamen nun ne deziris alparoli lin.

La rigardoj de la ĉeestantoj direktiĝis al la podio, kie ekstaris Krasen Drakov – la klasestro de Klara. Li devis eldiri la funebran parolon. Nun unuan fojon Safirov vidis lin. Antaŭ la ĉeestantoj ekstaris dudekkvarjara viro, vestita en nigra kostumo kun blanka ĉemizo kaj blua kravato. Lia hararo estis nigra, la okuloj malhelverdaj.

En la salono ekregis profunda silento kaj li ekparolis:

-Karaj gepatroj de Klara, karaj ŝiaj parencoj, geamikoj, gesamklasanoj, hodiaŭ en tiu ĉi pluva kaj trista tago ni estas ĉi

tie por adiaŭi nian karan filinon, amikinson, samklasaninon Klara. Juna ŝi forlasis tiun ĉi mondon. La sorto estis tre kruela kaj forprenis ŝin de ni por ĉiam. Neniam ni forgesos ŝin. Klara estis kara, bona filino, sincera kaj fidela amikino, perfekta lernantino. Ŝi havis grandan talenton, ŝatis la literaturon, verkis rimarkindajn eseojn kaj emociajn poemojn. En la poemoj Klara esprimis siajn amon, ĝojon, esperojn, kredon, dubojn. Ŝi deziris, ke la mondo, en kiu ni vivas, estu pli bona kaj pli justa.

Safirov atente aŭskultis la paroladon de Drakov, kiu sciis pri la verkado de Klara kaj certe legis ŝiajn versaĵojn. Io tamen en la konduto de Drakov vekis suspekton. Li estis maltrankvila, parolis kaj ŝvitis. Varmaj ŝvitgutoj rosigis liajn fruntojn kaj vizaĝon. La tutan tempon, dum li parolis, li evitis alrigardi la gepatrojn de Klara, kiuj staris dekstre de li.

“Mi devas baldaŭ pridemandi lin, decidis Safirov. Nepre mi iros en la gimnazon por renkontiĝi kun li.”

Post la funebra ceremonio Safirov rapidis reveni hejmen. Ege malbone li fartis kaj denove travivis la tutan tragedion. Denove atakis lin la konscienciproĉo, ke li ne sukcesis savi Klara-n. “Se mi estus iom pli rapida, eble mi estus povinta trovi ŝin, meditis li.”

Mila, la edzino de Safirov, surpriziĝis, kiam vidis lin eniri la loĝejon.

-Tre frue vi revenas hodiaŭ – rimarkis ŝi.

-Jes. Hodiaŭ estis la entombigo de Klara, la knabino, kiu malaperis kaj oni trovis ŝin mortinta – diris Safirov.

-Kompatinde – ĝemsuspiris Mila.

Ŝi bone konis la edzon. En la laborejo li aspektis viro kun firma karaktero. Iuj liaj kolegoj opiniis, ke li estas severa, postulema, tamen ili eraris. Safirov estis emocia kaj delikata. La homa tragedio profunde vundis lin kaj dolore li suferis. Nun Mila vidis, ke li malfacile travivas la morton de Klara. Du semajnojn li vivis, pensante pri ŝi, detale li ekkonis ŝian vivon, komprenis kia ŝi estis, al kio ŝi strebis, pri kio ŝi revis. Li

deziris klarigi al si mem kial Klara malaperis kaj kia estis la kialo pri ŝia malapero. Safirov certis, ke trovos ŝin, sed bedaŭrinde li ne sukcesis.

Li eniris la ĉambron kaj sidiĝis sur la kanapon. Mila ekstaris antaŭ li. La rigardo de ŝiaj okuloj, similaj al etaj bluaj lagoj, ĉiam trankviligis lin. Ia mola, kara brilo radiis en tiuj ĉi okuloj. Ĉio en Mila estis tenera: la glata vizaĝo, la delikataj brovoj, la etaj sukplenaĵoj, la hararo, kiu falis sur ŝiajn ŝultrojn kiel silkaj fadenoj.

Mila ĉiam tuj povis diveni kiam li estas malĝoja, kiam havas zorgojn aŭ iu kolerigis lin. Ŝi bone sciis, ke lia laboro estas streĉiga kaj deziris helpi lin. Neniam ŝi okupis lin pri bagatelaĵoj. Mila ne plendis, ke li ofte malfruas aŭ fojfoje matene revenas hejmen. Kiam ŝi malbone fartis, ŝi evitis ĝeni lin kaj preferis, ke li ne komprenu, ke ŝia sanstato ne estas bona.

-Ĉu mi kuiru kafon? – demandis Mila.

-Ne – diris li. – Nenion mi deziras.

Ŝi alrigardis lin.

-Jam mi estas kvardekkvinjara, – ekparolis Safirov. – Tiom da jaroj mi estas policano kaj mi ankoraŭ ne povas kompreni kio igas iujn homojn murdi. Kial ili iĝas murdistoj?

-Kial vi ne povas kompreni tion? – demandis Mila. – La homoj estas diversaj. Estas bonaj kaj malbonaj.

-Jes, sed estas homoj, kiuj naskiĝas en bonaj familioj, kreskas normale ĉe normalaj vivkondiĉoj kaj en iu momento fariĝas murdistoj.

-Multaj estas la kialoj – diris Mila. – Familioj povas esti bonaj, sed oni ne vivas nur en la familio. Ne forgesu, ke ekzistas malbonaj amikoj kaj diversaj aliaj cirkonstancoj...

-Tamen ĉu tiuj ĉi homoj ne povas kontroli siajn emociojn aŭ la inklino al murdo estas en ili jam de la naskiĝo? Verŝajne ĝi estas en ilia karaktero. Mi opinias, ke la inklino al murdo eble estas ie profunde en ilia konscio.

-Ŝajnas al mi, ke vi ne pravas! – replikis lin Mila. – Ĉiuj infanoj naskiĝas bonaj.

-Ne. Mi pravas. Dum jaroj la inklino al murdo nestas en tiuj homoj kaj en iu kriza momento ili ne povas subpremi ĝin. Ĝi estas pli forta ol ili kaj tiel ili iĝas murdistoj. Vi scias, ke en mia kariero mi vidis murdistojn kaj virojn, kaj virinojn. Same infanoj estas murdistoj, knaboj kaj knabinoj.

-Jes. Mi memoras pri du knaboj. Kiun ili murdis?

-La unua estis dekksesjara kaj la dua – dekkvinjara. Ili batis kaj murdis maljunan senhejmulon sen havi motivon. Por plezuro aŭ distro ili komencis bati la senpovan sepdekjaran senhejmulon kaj li mortis. Kaj ĉu vi memoras la du knabinojn, la unua – dekkvinjara, la dua – dekkvarjara, kiuj murdis sian samklasaninon nur tial, ĉar ŝi havis pli belajn vestojn ol iliaj.

-Tio estas terure. Murdi knabinon, sian samklasaninon, nur tial, ĉar ŝi estas pli bone vestita – ĝemsuspiris Mila.

-Ĉu vi memoras la kontiston, kiu pafmurdis sian edzinon? – demandis Safirov. – Li estis preskaŭ nia najbaro, loĝis en nia kvartalo. Inteligenta, saĝa homo kun prestiĝa profesio. Verŝajne dudek jarojn li estis pli aĝa ol sia edzino, supozis, ke ŝi kokras lin kaj kiam la edzino estis en la kafejo, proksime al nia domo, kun sia amikino, li iris tien kaj pafmurdis ŝin. Mi ne havas klarigon pri tiuj ĉi murdoj. Kaj nun, kiu murdis Klara-n kaj kial? Tiu ĉi demando turmentas min.

-Ĝis nun vi solvis eĉ pli malfacilajn kazojn kaj mi certas, ke baldaŭ vi solvos ankaŭ tiun ĉi. – diris Mila.

-Verŝajne. Mi trovos la murdiston, sed bedaŭrinde mi ne sukcesis savi Klara-n – diris Safirov.

-Vi estas laca. Vi devas ripozi. Trovu tempon por pli longa ripozo – diris Mila. – Jen, jam estas printempo. Ni devas decidi kie ni somerumos.

-Jes. Vi pravas. Nerimarkeble venis la printempo. Mi ne havis tempon vidi la florantajn arbojn, la florojn. Hodiaŭ mi rimarkis kiom multe da floroj estas. La homoj, kiuj venis por la

entombigo de Klara, portis multajn florojn kaj mi kvazaŭ estis en florgardeno.

-Ĉi-somere ni devas kune ripozi. Vi ĉiam havas laboron, sed ĉi-jare via forpermeso estu en aŭgusto kaj ni trio: vi, mi kaj Greta iru en montaron. Ni loĝas ĉe la maro kaj estus bone ripozi en montaro – proponis Mila.

-Mi faros ĉion eblan, por ke mia ferio estu en aŭgusto kaj ni kune ripozu en montaro – promesis Safirov.

-Greta baldaŭ revenos kaj ni vespermanĝos – diris ŝi. – Mi preparos la vespermanĝon. Kion vi deziras manĝi?

-Delonge mi ne manĝis frititajn terpomojn kaj ĉi-vespere mi volonte manĝos frititajn terpomojn kaj mi permesos al mi mem trinki unu malvarman bieron.

Mila iris en la kuirejon por pretigi la vespermanĝon kaj Safirov ŝaltis la televidilon por spekti la novaĵojn. “Mi devas telefoni al la loka televidstacio, ke oni plu ne anoncu pri la malapero de Klara Veselinova. La informo jam ne estas aktuala – diris al si mem Safirov.”

21.

Matene je la sepa kaj duono Safirov iris al la gimnazio, en kiu lernis Klara por renkontiĝi kun Krasen Drakov, la instruisto pri literaturo.

La gimnazio troviĝis sur placo “Libereco”, proksime al la granda preĝejo “Sankta Dipatrino”. La preĝejo kaj la gimnazio estis unu kontraŭ la alia je la du flankoj de la placo. Safirov trapasis la placon kaj eniris la gimnazian korton. La gelernantoj jam rapidis por la komenco de la lernohoroj. En la lernejo Safirov demandis la pordiston kie estas la kabineto de la direktoro.

-Sur la dua etaĝo, sinjoro – diris la pordisto.

Safirov ekiris sur la ŝtuparon. Je la dua etaĝo sur peza kaj masiva pordo estis ŝildo: “Vangel Peev – direktoro”. Safirov ekfrapetis kaj eniris. En vasta ĉambro, ĉe granda

skribotablo, sidis la direktoro. La mebloj estis luksaj kaj modernaj: kanapo, kafotablo, alta librobretaro. Sur la muroj – portretoj, verŝajne de la estintaj direktoroj. La gimnazio estis unu el la plej malnovaj en la urbo. Ĉi tie lernis multaj nun famaj personoj: sciencistoj, profesoroj, muzikistoj, pentristoj, geaktoroj.

-Bonan tagon, sinjoro Peev. Mi estas Kalojan Safirov, polica komisaro.

La direktoro ekstaris de la seĝo kaj mire alrigardis Safirov-on. Verŝajne en la gimnazion neniam venis polica komisaro. Kvindekjara, ne tre alta, iom dika, la direktoro estis kalva kun okulvitroj. Liaj grizkoloraj okuloj pli similis al malklaraj akvaj gutoj.

-Bonan tagon. Kio okazis? Ĉu iu lernanto kaŭzis problemon? – demandis li maltrankvile.

-Ne. Mi venis paroli kun Krasen Drakov, la instruisto – diris Safirov.

-Bone. En interleciona paŭzo vi povus paroli kun li – proponis la direktoro. – Mi kompreneble ne demandos kial vi devas paroli kun li, ĉar mi supozas, ke tio estas sekreto.

-Jes.

-Vi atendu Drakov-on ĉi tie – diris la direktoro. – Mi petos, ke oni alvoku lin.

-Dankon.

-Post dek minutoj la unua lernohoro finiĝos.

La direktoro proponis al Safirov sidiĝi en la fotelon ĉe la kafotablo. Safirov sidiĝis kaj prenis la ĵurnalon “Burgaj Novaĵoj”, kiu kuŝis sur la kafotablo. Sur la unua paĝo estis informo pri la morto de Klara kaj ŝia entombigo. La ĵurnalisto kompreneble skribis, ke ŝi falis de roko en kabo Otmanli.

Kiam la direktoro vidis, ke Safirov legas la artikolon pri la entombigo de Klara, demandis:

-Ĉu vi parolos kun sinjoro Drakov, rilate Klara-n Veselinova-n? Ja li estis ŝia klasestro.

-Ne – respondis Safirov, sed tuj demandis la direktoron:

-Ĉu vi konis Klara-n Veselinova-n?

La direktoro iom hezitis kiel respondi kaj diris:

-En la gimnazio lernas pli ol okcent gelernantoj. Mi ne povas koni ĉiujn persone. Nur kiam Klara Veselinova malaperis, mi eksciis, ke ŝi lernas en nia gimnazio. Mi tamen interesiĝis pri ŝi kaj Krasen Drakov diris, ke ŝi estis bona, diligenta lernantino.

La lerneja sonorilo anoncis la finon de la unua lernohoro. La direktoro telefonis al la sekretariino kaj petis ŝin diri al Drakov veni en la kabineton.

Post kvin minutoj aŭdiĝis frapeto je la pordo kaj Krasen Drakov eniris la kabineton de la direktoro. Nun li surhavis helverdan kostumon kaj flavan ĉemizon. Li rigardis la direktoron, poste Safirov kaj afable demandis:

-Sinjoro Peev, vi petis min veni.

-Jes. La sinjoro estas komisaro kaj deziras konversacii kun vi - kaj la direktoro montris Safirov-on.

Drakov iom embarasiĝis, sed provis kaŝi tion. Safirov ekstaris kaj salutis lin:

-Bonan tagon, sinjoro Drakov.

-Bonan tagon, sinjoro – kaj Drakov prezentis sin. – Mi estas Krasen Drakov, instruisto pri literaturo.

-Jes, mi vidis vin hieraŭ dum la entombigo de Klara Veselinova – diris Safirov.

-Mi eliros, por ke vi povu trankvile konversacii – diris la direktoro.

Safirov dankis, kaj kiam la direktoro eliris, li alrigardis Drakov kaj demandis lin:

-Sinjoro Drakov, vi estis klasestro de Klara Veselinova. Ĉu vi rimarkis ion neordinaran en ŝia konduto antaŭ ŝia malapero?

-Tute ne – respondis la instruisto. – Ŝi kondukis normale kiel ĉiam.

-Ĉu ŝi estis maltrankvila, emociiĝinta?

-Ne. Ŝi aspektis trankvila kaj tute ne montris, ke io aŭ iu ĝenis ŝin.

-Ĉu Klara regule frekventis la lernejon? Ĉu estis tagoj, kiam ŝi forestis? – demandis Safirov.

-Neniam ŝi forestis. Klara estis bona lernantino.

-Hieraŭ dum la funebra ceremonio vi diris, ke ŝi ŝatis la literaturon, verkis eseojn, versaĵojn. Ĉu vi legis ŝiajn versaĵojn?

-Jes, mi legis – respondis Drakov. – Klara plurfoje petis min legi ŝiajn versaĵojn kaj diri mian opinion pri ili.

-Mi ne dubas, ke vi atente legis ilin kaj diris vian opinion – rimarkis Safirov. – Kiaj estis la versaĵoj? Kiaj estis la temoj?

-Eble vi scias, sinjoro komisaro, ke la versaĵoj ne ĉiam havas temojn – iom ekridetis Drakov. – La poetoj esprimas siajn sentojn, meditojn, impresojn...

-Jes. Kion esprimis Klara en siaj versaĵoj?

-Kiel ĉiuj knabinoj je ŝia aĝo, ankaŭ ŝi esprimis siajn emociojn, ligitajn al la amo.

-Tio estas komprenebla. Estis ampoemoj, ĉu ne? Ĉu ili estis dediĉitaj al konkreta persono, al iu, kiun Klara amis?

-Mi tute ne scias tion – tuj respondis Drakov kaj atente alrigardis Safirov-on, kvazaŭ deziris diveni kion ĝuste li pensas. – Al mi Klara ne konfesis kiun ŝi amas.

-Mi komprenas. Mi deziras demandi vin kie vi estis la 15-an de aprilo post la unua horo kaj duono posttagmeze? – demandis Safirov malrapide, emfazante la daton kaj la horon.

-Mi tute ne komprenas vin. Kial vi demandas min pri tio kaj ĉu tiu ĉi demando estas ligita al Klara? –alrigardis lin Drakov ofendita.

-Vi devas respondi al la demando – atentigis lin Safirov serioze. – Kie vi estis la 15-an de aprilo post la unua horo kaj duono posttagmeze?

-Mi estis hejme. Mi finis la lernohorojn je la unua horo kaj je la unua kaj duono mi estis hejme.

-Ĉu iu povus konfirmi tion?

-Neniu – diris Drakov. – Mia edzino laboras kaj ne estis hejme, kiam mi revenis de la lernejo. Se iu najbaro hazarde vidis min povus konfirmi tion. Tamen mi ne scias kiu vidis min ĝuste tiam.

-Do, vi diras, ke post la fino de la lernohoroj vi revenis hejmen?

-Jes. Tion mi diras.

-Kie kaj kiun laboron faras via edzino? – demandis Safirov.

-Ŝia nomo estas Vera kaj estas vartistino en la infanĝardeno “Suno”. Ŝi laboras ĝis la deksepa horo kaj hejmen revenas je la deksepa kaj duono.

-Ĉu vi havas infanojn?

-Ankoraŭ ne. Antaŭ du jaroj ni geedziĝis – respondis Drakov.

-Mi aŭdis, ke vi havas vilaon en Otmanli.

-Vi bone ekkonis mian personecon kaj vivon, sinjoro komisaro – ekridetis iom ironie Drakov.

-Tio estas mia laboro.

-Jes, mi havas vilaon. Ĝi ne estas ĝuste mia, sed de miaj gepatroj.

-Ĉu vi ofte iras tien?

-Tre malofte.

-Kiam lastfoje vi estis en la vilao? – demandis Safirov.

-Mi ne memoras, eble antaŭ monato aŭ du.

-Nun ni devas iri en vian vilaon por trarigardi ĝin.

-Ĉu tio estos priserĉado? – demandis maltrankvile Drakov.

-Povas esti.

-Tamen vi bone scias, ke vi devas havi oficialan ordonon por fari tiun ĉi priserĉadon.

-Jes. Mi havas ĝin – kaj Safirov montris la ordonon pri priserĉado de la vilao.

-Sed... nun la ŝlosilo ne estas ĉe mi – provis eviti la priserĉadon Drakov.

-Ni unue iros al via loĝejo, kie vi prenu la ŝlosilon kaj poste ni iros en la vilaon. Do, ni iru.

Safirov telefonis al serĝento Kolev, ke li venu kun du policanoj el la esplorgrupo antaŭ la gimnazio, ĉar kun Drakov ili veturos al Otmanli por priserĉi lian vilaon.

Safirov dankis al la direktoro kaj diris al li, ke hodiaŭ Drakov ne daŭrigos la instruadon, ĉar oni devas pli detale pridemandi lin. La direktoro miris kaj provis diveni kial la polico devas pridemandi Drakov-on kaj kion ĝuste li faris.

Kiam Safirov kaj Drakov eliris el la lernejo, antaŭ ĝi jam atendis ilin serĝento Kolev kun du policanoj el la esplorgrupo. Ĉiuj eniris la aŭton kaj ekveturis al la domo de Drakov por ke li prenu la ŝlosilon de la vilao.

22.

La vilao de Drakov troviĝis proksime al la vilao de familio Veselinovi, sed same en la arbaro kaj ne videblis de la vojo. La polica aŭto haltis antaŭ la vilao, unuetaĝa en ne granda korto. Al la pordo estis platŝtona pado. Drakov malŝlosis la pordon kaj la policanoj eniris. La vilao konsistis el tri ĉambroj, kuirejo kaj banejo. Unu el la ĉambroj estis manĝejo kun longa ligna manĝotablo kaj kelkaj seĝoj. En ĝi estis televidilo, ŝranko por manĝilaro, fridujo. La aliaj du – estis dormoĉambroj, en ili – litoj, vestoŝrankoj, librobretaroj, skribotablo.

La policanoj komencis la priserĉadon. Ili malfermis ŝrankojn, tirkestojn, rigardis sub la litoj, malfermis la fridujon, kie estis boteloj da konjako kaj viskio. El unu el la tirkestoj de la skribotablo Kolev elprenis kajeron, sur kies titolpaĝo estis skribite: “Versaĵoj – Klara Veselinova”.

-Jen – diris Kolev – la kajero kun la versaĵoj de Klara.

-Kial ĝi estas ĉi tie? – demandis Safirov.

-Mi jam diris, ke Klara donis ĝin al mi tralegi la poemojn kaj diri mian opinion - respondis Drakov.

-Kaj vi tralegis ilin, ĉu ne?

-Kompreneble.

-Ĉu Klara venis iam ĉi tien? – demandis Safirov.

-Neniam. Ŝi ne sciis, ke mi havas vilaon ĉi tie – respondis Drakov.

-Ĉu vi certas?

-Kompreneble.

-Bone – diris Safirov.

Proksime al la skribotablo la policanoj rimarkis, ke la ligna planko estis diligente lavita.

-Kiam vi lavis la plankon ĉi tie? – montris Safirov la lavitan lokon.

-Mi ne lavis ĝin. Eble mia edzino purigis ĉi tie kaj lavis la plankon – respondis iom embarasita Drakov.

Sur unu el la litoj la policanoj trovis kelkajn blondajn harojn kaj atente prenis ilin por esploro.

Kiam la policanoj finis la priserĉadon, Safirov diris al Drakov:

-Mi konsilas vin resti en la urbo. Veturu nenien, ĉar necesos denove pridemandi vin.

-Mi ne planas veturi. Vi bone scias, ke mi estas instruisto kaj mi devas instrui.

La policanoj ekiris. Veturante al Burgo, Safirov diris al Kolev, ke en la laboratorio oni bone esploru la trovitajn harojn kaj konstatu ĉu ili estas de Klara aŭ ne.

23.

Post tago Kolev donis al Safirov la raportaĵon de la laboratorio, en kiu oni skribis, ke la haroj, trovitaj en la vilao de Drakov, estas de Klara.

-Tion mi supozis – diris Safirov – Drakov asertis, ke Klara ne sciis, ke li havas vilaon en Otmanli.

Dum Safirov kaj Kolev konversaciis, la deĵoranta ĉe la pordo policano telefonis, ke iu sinjoro, kies nomo estas Krasen Drakov, deziras paroli kun komisaro Safirov.

-Ĉu Drakov? – demandis Safirov.

-Jes.

-Permesu al li veni.

Post kelkaj minutoj Drakov eniris la kabineton.

-Bonan tagon, sinjoro komisaro – salutis li.

-Bonan tagon – diris Safirov kaj alrigardis lin.

Nun Drakov aspektis laca, kvazaŭ la tutan nokton li ne dormis. Lia vizaĝo estis pala kaj liaj malhelverdaj okuloj similis al du marĉetoj.

-Bonvolu sidiĝi – diris Safirov.

Drakov sidiĝis sur la seĝon, alrigardis Safirov-on kaj Kolev-on kaj mallaŭte ekparolis:

-Mi venis konfesi ĉion.

-Ni aŭskultas vin – diris Safirov kaj proponis al serĝento Kolev same sidiĝi.

-Jam tri jarojn mi estis klasestro de Klara Veselinova. Kiel vi jam scias, mi instruas literaturon. Ofte la hejmaj taskoj de la gelernantoj estis verki eseojn pri diversaj literaturaj temoj. Klara Veselinova verkis tre bonajn, interesajn eseojn kaj mi gratulis ŝin.

-Tion ni jam scias – diris Safirov.

-Ŝi estis emocia, havis originalan pensmanieron kaj spertis klare skribe esprimi sin. Estis okazoj, kiam mi petis ŝin voĉe tralegi sian eseon antaŭ la gelernantoj, por ke ili komprenu kiel devas esti verkita eseo.

Antaŭ jaro Klara venis al mi kaj diris, ke ŝi verkas versaĵojn kaj petis min tralegi ilin kaj diri ĉu ili estas bonaj aŭ ne.

-Ĉu tiam ŝi donis al vi sian kajeron kun la versaĵoj? – demandis Safirov.

-Tiam ŝi donis al mi nur tri versaĵojn, kiujn mi tralegis. Ili estis bonaj. Plaĉis al mi kaj sincere mi diris, ke ŝi havas talenton kaj devas verki.

Post tiuj ĉi tri versaĵoj ŝi komencis pli ofte doni al mi novajn kaj novajn versaĵojn, kiujn mi legis. Pasintsomere, dum la somera ferio, en aŭgusto, mi hazarde vidis Klara-n en Otmanli. Ŝi diris, ke ŝiaj gepatroj havas tie vilaon. Ankaŭ mi menciis, ke mi same havas vilaon tie.

-Ĉu ŝi estis kun la gepatroj tie?

-Jes, ili estis tie unu semajnon. Preskaŭ ĉiutage mi kaj Klara renkontiĝis, promenadis en la arbaro, konversaciis pri literaturo, poezio. Tiam mi estis sola en Otmanli. Mia edzino laboris kaj ne povis esti kun mi.

Kiam komenciĝis la lernojaro, en septembro, Klara denove komencis doni al mi versaĵojn. Ofte ŝi atendis min post la fino de la lernohoroj kaj deziris konversacii kun mi. Foje ŝi donis al mi versaĵon kaj diris, ke estas dediĉita al mi. Tiam ŝi konfesis, ke amas min kaj sopiras pli ofte esti kun mi.

-Nun mi komprenas kion signifas la versoj en ŝia versaĵo: *Vi kiel vino ebriigas min, kiel Drako vi flamigas min* – diris Safirov.

-Jes – diris Drakov. – Mi provis klarigi al ŝi, ke tio ne estas akceptebla. Ja, mi estas instruisto kaj ŝi – lernantino. Tamen ĉiutage dum la lecionoj ni vidis unu la alian. Klara estis tre bela, saĝa, ne similis al aliaj lernantinoj, aspektis pli matura ol ili kaj iel nesentoble mi same ekamis ŝin.

-Ĉu tio estas normala? Instruisto kiu ekamis lernantinon?

-Mi ne havis fortojn kontraŭstari al tiu ĉi amo – diris Drakov – kaj ni komencis renkontiĝi kaŝe. Fojfoje per mia aŭto, post la lernohoroj, ni veturis al Otmanli en mian vilaon, kie ni pasigis horon aŭ horon kaj duonon. Neniu sciis kaj neniuj supozis, ke ni renkontiĝas.

-Ĉu vi ne provis iel ĉesigi tiujn ĉi renkontiĝojn?

-Plurfoje mi provis, mi diris al ŝi, ke ni ne devas fari tion, sed ne eblis... Klara obstinis. Ŝi telefonis al mi, telefonis kiam mi estis hejme, kaj mi ne sciis kion diri al mia edzino. Klara diris, ke ŝi ne povas vivi sen mi. La 15-an de aprilo, post la lernohoroj, ni denove renkontiĝis kaj iris al Otmanli.

-Kial vi diris al mi, ke la 15-an de aprilo vi estis hejme? – demandis severe Safirov.

-Mi ektimis kaj provis kaŝi la veron – diris Drakov.

-Ni iris al Otmanli kaj mi diris al ŝi, ke tio estas nia lasta renkontiĝo. Plu ni ne renkontiĝos! Tiam Klara ekploris, diris, ke ŝi estas graveda. Mi ne kredis kaj diris, ke ne mi gravedigis ŝin. Klara eksplodis, komencis kriegi kaj minacis min, ke se mi ne deziras plu vidi ŝin, ŝi naskos la infanon kaj ĉiuj ekscios, ke mi estas la patro. Mi avertis ŝin ne fari tion. Mi same koleriĝis. Klara proksimiĝis al mi, deziris ĉirkaŭbrakumi kaj kisi min, sed mi forte puŝis ŝin.

-Ĉu vi frapis ŝin per io?

-Ne! Mi forte puŝis ŝin mane. Ŝi falis kaj frapis sian kapon je la skribotablo. La vundo komencis sangi. Mi provis levi ŝin, sed vidis, ke ŝi mortis. Tiam mi ne sciis kion fari. Mi levis ŝin, portis ŝin al la aŭto kaj ekveturis al la rokoj. Tie mi ĵetis ŝin de la rokoj. Mi estis freneza kaj ne konsciis kion mi faras. Poste mi revenis en la vilaon kaj purigis ĉion. Jen, tion mi faris.

Drakov eksilentis.

-Nun mi plenkonscie akceptos la konsekvencojn – ekflustris li.

Safirov kaj Kolev same silentis. Ne eblis ion diri. Safirov eĉ kompatis Drakov-on. Li estis juna, havis familion, bonan profesion, sed tio estis la fino de lia vivo.

Sofio, la 25-an de februaro 2018

Pri la aŭtoro

Julian Modest naskiĝis en Sofio en 1952. Li estas unu el la plej aktivaj nuntempaj Esperanto-verkistoj. Liaj rakontoj, eseoj kaj artikoloj aperis en diversaj revuoj “Hungara Vivo”, “Budapeŝta Informilo”, “Literatura Foiro”, Fonto”, “Monato”, “Beletra Almanako”, “La Ondo de Esperanto”, “Zagreba Esperantisto” kaj aliaj.

Li estas aŭtoro de la Esperantaj libroj:

- ”Ni vivos!” – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof
- ”La Ora Pozidono” – romano
- ”Maja pluvo” – romano
- ”D-ro Braun vivas en ni” – dramo
- ”Mistera lumo” – novelaro
- ”Beletraj eseoj” – esearo
- ”Songe vagi” – novelaro
- ”Invento de l’jarcento” – komedioj
- ”Literaturaj konfesoj” – esearo
- ”La fermita konko” – novelaro
- “Bela songo” – novelaro
- “Mara Stelo” – novelaro
- “La viro el la pasinteco” – novelaro
- "Murdo en la parko" – krimromano
- "Dancanta kun ŝarkoj" – novelaro
- "La enigma trezoro" – romano
- "Averto pri murdo" – krimromano

Krome li verkis plurajn bulgarlingvajn librojn. De 1999 li estas ĉefredaktoro de la revuo ”Bulgara Esperantisto”